

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:

József Németh (red.)
Mireille Grosjean
Luigia Oberrauch Madella
Ahmad Reza Mamduhi
Rob Moerbeek

Kunlaborantoj de la aktuala numero:

Laura Brazzabeni
Filomena Canzano
Liba Gabalda
Aldo Grassini
Mireille Grosjean
Marija Jerković
Ilona Koutny
Alessandra Madella
Teddy Nee
Radojica Petrović
Fernando Pita
Philippe Planchon
Cesco Reale
Ahmad Reza Mamduhi
Yamakawa Syuiti



ilei

Fabelo pri la historio de Esperanto
(vidu p. 20)

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj



ENHAVO

Enkonduko (Ahmad Reza MAMDUHI)	3
Premio Maŭro La Torre (Ahmad Reza MAMDUHI).....	4
<i>Estas tre bona ideo partopreni!</i> (A. MADELLA, R. CORSETTI)	5
Ŝtata premio al esperantista lingvisto (Radojica PETROVIĆ).....	7
Aldo GRASSINI: <i>Tuŝsenso kaj aliro al artĝuado</i>	11
Teddy NEE, Cesco REALE: <i>IKON - lingvo de ikonoj</i>	14
<i>La aventuroj de Saĝa Steleto kaj de la Mirinda Teamo</i> (A. MADELLA)	17
<i>„La Eta Krokodilo kaj la Verda Stelo”</i> (Alessandra MADELLA)	20
El la landoj kaj sekcioj (FR, HU, IT, JP, HR, PL, CH)	24
<i>Vikipedio en Esperanto</i>	36
Philippe PLANCHON: <i>Diakronio kaj evolu-fazoj de la leksiko [...]</i>	39
Kongresaj kaj Simpoziaj informoj (Laura BRAZZABENI, Fernando PITA). 50	
Informoj pri ILEI, redakciaj informoj	53

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Ahmad Reza MAMDUHI, Nr. 9, K. Iraj, Kh. Dowlatshad Gharbi, Kh. Farid-Afshar, Kh. Vahid Dastgerdi, Tehran-1916613514, Irano. Tel. +98 9122115419 (Telegram, WhatsApp). <mamduhi@gmail.com>. Universitata agado, ekstera komunikado kaj varbado, observanto kaj komitatano A ĉe UEA.

Sekretario: Elena NADIKOVA, ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. +7 919-670-25-34. <lena_espero@mail.ru>. Lerneja agado.

Estrarano pri financoj: Karine ARAKELJAN, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio. ilei.kasisto@gmail.com (financoj). Tel. +374 55 279906 (Viber, WhatsApp), <karinko_arm@mail.ru>. Ekzamenoj.

Vic-prezidanto: Alessandra MADELLA, via Prampolini 8 43122 Parma, Italio, Tel. +39 0521 785582, <a.madella@tiscali.it>. Lerneja, universitata, scienca, landa kaj regiona agadoj (Orienta Azio), ekstera komunikado kaj varbado.

Estrarano pri kongresoj: Laura BRAZZABENI, via San Filippo 52, 58031 Arcidosso (GR), Italio. <laura.brazzabeni@gmail.com>. Tel. +39 3286461063 (WhatsApp). Lerneja agado.

Estrarano: Marija JERKOVIĆ, Jarunska 6, 10000 Zagreb, Kroatio. Tel. +385 981771741. <mjerkovic@net.hr>. Lerneja kaj landa agadoj.

Estrarano: Fernando PITA, Estr. Cel. Vieira 134, bl 3, ap 402; Irajá; Rio-de-Janeiro cep 21220-310, Brazilo. <magisterpita@gmail.com>. Tel. +55 21 98863-3854 (Telegram, WhatsApp). IPR, universitata kaj scienca agadoj, observanto ĉe TEJO.

Estrarano: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobođenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. <radojica.petrovic.rs@gmail.com>. Tel. +381 64 8525321 (Viber, WhatsApp, Telegram). Eduk-projektoj, universitata agado, instrukapablighado.





Scienca Komitato

Prezidanto: Humphrey Tonkin,
Usono, University of Hartford;
AdE¹

Membroj:

Duncan Charters, Usono, Principia
College, Elsau

Renato Corsetti, Britio/Italio,
Università degli Studi di Roma
„La Sapienza”; AdE¹

Probal Dasgupta, Barato, emerita
profesoro de LRU, Indian
Statistical Institute, Kolkata; AdE¹

Aloyzas Gudavičius, Litovio,
Šiaulių universitetas

Boris Kolker, Usono; AdE¹

Iłona Koutny, Pollando/ Hungario,
Uniwersytet im. Adama
Mickiewicza w Poznaniu

Stefan MacGill, Nov-Zelando/
Hungario

Aleksandr Melnikov, Rusio,
Академия Сельскохозяй-
ственного Машиностроения,
AdE¹

Radojica Petrović, Serbio,
Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, MTA
Nyelvtudományi Intézet

¹ AdE – Akademio de Esperanto

Sur la titolpaĝo: „La Eta
Krokodilo kaj la Verda Stelo”
(vd. p. 20)

Sur la dorskovrilo: Baziliko de
Sankta Francisko (vd. la
artikolon „Marŝado por Paco kaj
Frateco” sur p. 27)

Enkonduko

Karaj legantoj,

en tiu ĉi numero troveblas kelkaj interv-
juoj fare de ILEI-estraranoj kun diversaj
e-istoj, inter ili, prof. Probal Dasgupta,
eksprezidanto de UEA, al kiu oni aljuĝis
tre prestiĝan premion pro lia tuta verkaro,
kiu inkluzivas ankaŭ plurajn Esperantajn
verkojn. Pro tio mi elkore gratulas lin kaj
ĉiujn samideanojn mondvaste, kaj nun mi
dezirus iomete paroli ĝenerale pri
intervjuo. Delonge mi kredas, ke intervjuo
povas esti ege riĉa, konciza kaj rekta
konatiĝo kun homoj – ĉu famaj ĉu ne – pri
ili mem kaj kion ili faris/as, planas kaj
opinias rilate al tre diversaj temoj kaj
kampoj: ekde la konkretaj personaj ecoj
kaj emoj ĝis la malkonkretaj filozofi(ec)aj
terenoj.

Aparte interesas min la proksimeca kaj
sincera sinteno de intervjuo(n)toj dum la
interparolo, kiu povas montri tute
nesciatajn faktojn eĉ al la plej arda
sekvantoj de tiu aŭ alia renoma homo.

Ekz-e dum dek vivaj Zoom-intervjuoj,
kiujn mi faris kun prof. Renato Corsetti
eble antaŭ du jaroj, min vere allogis tute
novaj faktoj pri li, liaj agadoj kaj pens-
maniero, i.a. pri la movado kaj grandaj
movadanoj kiel Ivo Lapenna, Tibor Sekelj
kaj multaj aliaj. Do mi finas per invito al
vi ekintervui viajn ŝatatajn movadanojn/
pedagogojn – kiuj nun ne devas vivi ĉe vi
aŭ eĉ en via lando, danke al la interretaj
rimedoj – kaj sendi la rezulton al IPR por
la probbla publikiĝo.

Kaj mi ne forgesu memorigi al vi pri
rememбриĝo en ILEI por la nova jaro 2022
abonante ĝian valoran organon IPR.

Ĉion plej bonan,

Ahmad Reza MAMDUHI

IPR 21/4➤3





Premio Maŭro La Torre

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), kunlabore kun la familio La Torre, anoncas konkurson pri esplorlaboro en unu el la kampoj, en kiuj laboris la karmemora prezidanto de ILEI, profesoro Maŭro La Torre (1946-2010). En 2011 la Komitato de ILEI elektis profesoron Maŭro La Torre Honora Membro de ILEI.

La esplor-kampoj estas:

- Aplikoj de lingvoteknologio al Esperanto kun rezultaj vortaroj aŭ pli ĝeneralaj lingvosciencaj pritraktoj
- Interkultura edukado per Esperanto
- Instruado de Esperanto kaj iloj por instrui Esperanton
- Perfektigaj kursoj por instruantoj de Esperanto
- Retaj kursoj pri Esperanto
- Evoluoj de la vortrezoro de Esperanto tratempe kaj nuntempe

La kandidatoj anoncu sian intencon partopreni kaj sian temon ĝis la 1-a de januaro 2022. La ILEI-estraro kaj la familio La Torre tiam starigos juĝ-komisionon en rilato kun la temo de la esplor-laboro.

La esplor-laboro devas esti dokumentita kaj priskribita en raporto de almenaŭ 20 A4-paĝoj, maksimume 30 paĝoj. Ĉiuj kandidatoj transdonu siajn laboraĵojn rete al ilei.prezidanto@gmail.com ĝis la 30-a de aprilo 2022 por la okazigo de la konkurso, kaj la prezidanto transdonos ilin al la familio La Torre, al ILEI kaj al la ĵurio.

La anonco pri la gajninto okazos antaŭ la 30-a de junio 2022. La gajninto devos sendi naŭ paperajn ekzemplerojn de sia laboraĵo, tio estas al la familio La Torre kaj po unu, al diversaj gravaj Esperanto-bibliotekoj en la mondo laŭ la programo de ILEI „Ni Savu Niajn Semojn”.

La premio konsistas el sumo de 500 eŭroj. ILEI retenas al si la rajton eventuale aperigi la gajnintan raporton. La konkurso La Torre okazis jam du fojojn, en 2015 kaj en 2018. La trian fojon, la premio kaj la diplomo estos transdonitaj en la jaro 2022 okaze de la 55-a ILEI-Kongreso en Kebekurbo kaj pli vaste prezentata en la 107-a Universala Kongreso de UEA en Montrealo.

*Ahmad Reza Mamduhi
prezidanto de ILEI*





Estas tre bona ideo partopreni!¹

RC: Renato CORSETTI

AM: Alessandra MADELLA

AM: Ĉu vi povas diri al ni ion pri Maŭro La Torre?



RC: Jes. Maŭro la Torre estis la unua juna esperantisto, kiun mi renkontis antaŭ sesdek jaroj aŭ eĉ pli. Kaj li kaptis min al la movado per rekta mensogo, ĉar ĉiuj esperantistoj en la Roma grupo estis maljunaj. Mi estis juna kaj ĉi tiuj estis sinjorinoj sesdek-jaraj, sepdek-jaraj. Kaj estis Maŭro, kiu tiam estis dekok-jara. Mi demandis lin: ĉu ĉiuj esperantistoj estas tiel maljunaj? Kaj li diris: „Ne, ne. En Romo ekzistas la junulara grupo. Poste mi montros al vi!” Fakte, la junulara grupo en Romo estis praktike li kaj lia amiko, kiu loĝis en la sama konstruaĵo. Sed tiel komenciĝis la rilato kaj mi poste restis en la movado. Tio okazis en 1965 verŝajne.

AM: Poste vi estis kolegoj dum multe da jaroj, ĉu ne?

RC: Jes. Do, poste ni faris amason da aferoj kune en la movado dum multaj jaroj en Itala Esperanto-Junularo. Poste hazarde en iu momento kaj li kaj mi ekinstruis en la universitato en du apartaj fakultatoj en Romo. Sed tuj ni trovis manieron kunlabori pri Esperanto, ĉar li estis en io, kio nomiĝis Laboratorio pri Eksperimenta Pedagogio. Tiam eksperimenta pedagogio estis instruado pere de komputiloj, ĉar li estis fakulo pri komputiloj. Kaj ni aranĝis iun ne-ĉeestan kurson pri Esperanto por italaj instruistoj. La universitato mastrumis la programon. La instruistoj tra la tuta lando aliĝis, ricevis paperan materialon – tiam estis nur papera – de la universitato. Kaj eĉ oni eksperimentis pri telefonaj interparoloj por instrui la paroladon, la prononcon ktp. Tiam ĝi estis io eksterordinara. Estis futureca. Kaj la afero daŭris du jarojn eĉ kun ekzamenoj. Do, la instruistoj venis al Romo kaj en la universitato faris la ekzamenon de Esperanto. Intertempe, Maŭro fariĝis prezidanto de ILEI kaj lia granda pasio estis la lernejo Tibor Sekelj, kiu estis virtuala internacia lernejo kun klasoj el ĉiuj kontinentoj, kiuj interŝanĝis

¹ Fonto: Ĉina Radio Internacia, 2021-09-28, <http://esperanto.cri.cn/e-club/enjoyreading/4204/20210928/704814.html>



mesaĝojn. Li kreis iun retan medion, kiu tiam estis io tre avangarda. Nun ĉiuj havas tiujn programojn. Kaj la afero funkciis tre bone. Eĉ ĝi estis prezentita al UNESKO kiel modelo de estonta instruado uzanta komputilojn. Do, tiel la afero funkciis dum jardekoj, fakte.

AM: Kia estis la respondo de UNESKO pri tio?

RC: Ĝi estis favora, kiel kutime. Sed favora ne signifas, ke ili poste faris ion konkretan aŭ subvenciis. Tiam ILEi ankaŭ havis rilatojn kun UNESKO, kiuj poste estis perditaj dum unu periodo kaj poste reakiritaj. Sed la afero funkciis.

AM: Kiel grava estis interkulturo en tiu projekto?

RC: Tio estis lia ĉefa intereso. Pro tio mi parolis pri lernejo el pluraj kontinentoj. Laŭ li ĉi tiuj infanoj devis interŝanĝi proverbojn, rakontojn pri siaj viv-spertoj por ĝuste kompreni unu la alian. Li estis tre atenta pri tiu ĉi afero, interkulturo, interkompreniĝo inter kulturoj.

AM: Ĉu vi povas diri al ni ion pri tiu ĉi premio Maŭro La Torre?

RC: La premio estis starigita de la familio, kiam li mortis, nun eble antaŭ dek jaroj. Temas pri premio, kiu premias verkojn en la ĉefaj kampoj de lia agado. Sed lia agado estis kaj komputiloj kaj lingva analizo per komputiloj – tiam estis tre avangarde fari tekstarojn kaj vidi kiom ofte estas finaĵoj ktp., instruado, interkulturo. En ĉiuj ĉi tiuj kampoj homoj povas prezenti laborojn. Estas iu internacia komisiono, kiu juĝas kaj decidas pri la premioj.

AM: Ĉu vi pensas, ke estas tre malfacile partopreni?

RC: Ne vere. Sed certe la laboroj devas esti universitat-nivelaj. Ne tiel ampleksaj kiel disertacio. Sufiĉas artikolo dudek-paĝa. Sed, laŭ la universitataj normoj, ĝi devas havi bibliografion, referencojn, eventuale eksperimentojn, se temas pri eksperimento. Sed ĉiuj povas partopreni.

AM: Do, vi pensas, ke estas tre bona ideo partopreni.

RC: Jes, certe. Kaj la familio tre volonte ankoraŭ subtenas la premion.

AM: Koran dankon, kara Renato.

RC: Dankon al vi.





Ŝtata premio al esperantista lingvisto

Prezento de la premiito

Ĉi-jare, la Premio Vidyasagar estas por la unua fojo aljuĝita al esperantisto. Tiun ĉi premion, rilatantan al la tuta verkaro de la respektivaj kandidatoj, la registaro de la gubernio Okcidenta Bengallando (en Barato) lanĉis en 1980 honore al la memoro de la granda klerulo, edukisto, instituci-konstruinto kaj soci-reforma pioniro Ishwar Chandra Vidyasagar (1820-1891). En 2021 ĝi estis rebaptita la Premio Vidyasagar-Dinamoyee (kunhonore al lia edzino) kaj estas nun aljuĝata de la registara fako pri supera eduko kunlabore kun la nove establita Vidyasagar Academy (Akademio Vidyasagar). La 26-an de septembro 2021, okaze de la 201a naskiĝdatreveno de Ishwar Chandra Vidyasagar, la esperantista lingvisto Probal Dasgupta kaj tri samjaraj premioj en aliaj (sociaj kaj edukaj) terenoj tuŝitaj de la pioniraj strebadoj de Vidyasagar, ricevis la Premion Vidyasagar-Dinamoyee en la ejo de la akademio Vidyasagar en Kolkato. En tiu domo Vidyasagar mem loĝis en la finaj jaroj de sia vivo.

Probal Dasgupta, studinta en la sanskrita kolegio (Kolkato), la dekana kolegio (Puneo) kaj la novjorka universitato, instruis lingvosciencan en la universitato de Kolkato, la dekana kolegio, la universitato de Hajderabado kaj la barata statistika instituto en Kolkato; de tiu lasta posteno li emeritiĝis en 2018. Esperanton li helpinstruis en 1978 kun David Jordan en la sanfranciska somera



kursaro, kiu estis la praformo de NASK kaj en 1988 kun Marjorie Boulton en la barlastona somera kursaro. Liaj eldonaĵoj koncernantaj la lingvistikon inkluzivas *The Otherness of English: India's Auntie Tongue Syndrome* (1993), *Explorations in Indian Sociolinguistics* (kun Jayant Lele kaj Rajendra Singh, 1995), *After Etymology: Towards a Substantivist Linguistics* (kun Alan Ford kaj Rajendra Singh, 2000), *Inhabiting Human Languages: The Substantivist Visualization* (2012), *Kathaar Kriyaakarma* (bengallingva: 'La agadoj de la vortoj', 1987), *Chinna Kathaay Saajaaye Tarani* (bengallingva: 'Sur boato ornamita per vortoj rompitaĵ', 2011), *Bhaashaar*





Bindubisarga ('La cediloj kaj cirkumfleksoj de la homa lingvo', 2012), *Merur Praarthanaa: Bishuber Uttar* ('La polusoj preĝas: la ekvatoro plenumas', 2015). Liaj eldonaĵoj en Esperanto inkluzivas la poemaron *Primico* (tradukoj de poemoj de Rabindranath Tagore, 1977), *Mi juna* (tr. de aŭtobiografio de Manashi Dasgupta, 1989), *Klera edzino* (tr. de romano de Upendronath Ganggopaddhae, 1994), *Dormanta hejmaro* (tr. de romano de Manashi Dasgupta, 2006) kaj *Loĝi en homaj lingvoj: la substancisma perspektivo* (2011). Pere de Esperantaj pontotradukoj li bengaligis la kroatan infanromanon *Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić* de Ivana Brlić-Mažuranić (2006), la svedan teatraĵon *Nemeza* de Alfred Nobel (2014) kaj la finnan romanon *Sep fratoj de Aleksis Kivi* (2020). Dasgupta estas honora membro de la lingvistika societo de Usono jam de 2004. La barata konsilio pri la filozofia esplorado nomumis lin sia vizitprofesoro de la jaro por 2009. En 2012 estis aljuĝita al li la Premio Archana Chaudhuri de Bangiya Sahitya Parishad, la bengala literatura akademio. En 2006 li estis prezidanto de la Internacia Ekzamena Komisiono de ILEI-UEA. De 2007 ĝis 2013 li estis prezidanto de UEA. De 2016 ĝis 2022 li estas prezidanto de la Akademio de Esperanto.

Intervjuo

PD - Probal DASGUPTA

RP - Radojica PETROVIĆ

RP: Dankon ĉar vi konsentis pri la intervjuo kaj refojan gratulon pro la prestiĝa rekono al vi kaj, ĉi-pere, al Esperanto. La premiito-koniga teksto diras multon pri vi, via scienca laboro kaj via agado por Esperanto. E-movadanoj scias pri vi multon pli. Tamen, ĉu vi ŝatus aldoni ion pri vi, kion viaj E-movadaj konatoj kaj estimantoj eble ne konas?

PD: Mi pensas, ke utilas atentigi pri la gastigado kaj pri Godelo (la aŭstra matematikisto Kurt Gödel, 1906-74).

Dum multaj jaroj mi eseadis en la revuo *Esperanto* kaj aliloke pri la rolo de Esperantujo kiel kultivejo por modelaj rilatoj inter gastoj kaj gastigantoj. Nia komunumo vivas per siaj kongresoj kaj amasrenkontiĝoj kaj devigas nin senĉese praktiki la artojn gastigi kaj gastigi. Hodiaŭ kreskegas la amasmigrado trans landlimoj kaj tiu demando fariĝis mondscale grava. Esperantujo devas pliprofundigi siajn komprenojn de la gastiga rilatado inter homaj komunumoj.





La matematikisto Godelo evoluigis la pensadon pri la rilatoj inter matematikaj lingvoj, precipe la rilato inter „objekta lingvo” priparolata kaj „metalingvo” priparolanta. Nian kultivadon de neŭtrale-homa lingvo ni prezentu kiel fasonadon de modela, home uzebla metalingvo, kiam ni alparolas sciencon publikon kleran pri la matematiko. Ĉi-terene mi prelegis kaj verkis en la bengala kaj esperas iam verki ankaŭ en Esperanto.

RP: Kian rolon havas interligvistiko kaj esperantologio en via scienca laboro de lingvisto?

PD: Esencan. La teorio de la vortfarado, la debato pri la participoj, tio kion De Hoog verkis pri la „tiom-kiomisma malsano” en Esperanto, la vidpunkto de Waringhien en *Lingvo kaj vivo* pri la intima rilato inter la adjektivoj kaj la verboj – ĉio ĉi forte influis miajn esplorojn pri tiuj fenomenoj en la bengala kaj aliaj lingvoj. Mi povus facile multigi ekzemplojn.

RP: Ĉu viaj neesperantistaj kolegoj, lingvistoj aŭ alifakaj universitatanoj, akceptas kaj aprezas viajn rezultojn sur la tereno de interlingvistiko kaj esperantologio ĉar ili venas de la renoma profesoro Probal Dasgupta pli ol ili aldonas al la aprezo pri via laboro de lingvisto pro viaj atingoj de esperantisto?

PD: Tio varias laŭ la regionoj. Kiel lingvisto mi estas pli konata en Barato ol alilande kaj la ĝenerala publiko en Barato malmulte konscias pri Esperanto. Tamen specife en la barata subŝtato Okcidenta Bengallando, kie mi loĝas inter miaj samlingvanoj, pioniroj kiel Lakshmiswar Sinha kaj Badal Sircar establis klaran publikan bildon pri Esperanto kaj tial oni aprezas ambaŭ flankojn. En Eŭropo kaj Ameriko, unuj konas la esperantistajn laborojn, aliaj la lingvistajn; tre malmultaj konscias pri ambaŭ.

RP: Interlingvistiko ankoraŭ ne aperas en la oficiala lingvistiko kiel ĝia branĉo, tamen planlingvoj estas serioze traktataj en iuj gravaj lingvistikaj verkoj, ekz. The Cambridge Encyclopedia of Language de David Crystal (Cambridge University Press, 2010). Kiel vi vidas interlingvistikon inter (aŭ ekster?) la sistemo de lingvosciencoj?

PD: Pli-malpli samtempe kun ĉi tiu intervjuo aperos en la faka revuo *Linguistic Frontiers* referaĵo, en kiu mi reliefigas la krize malklaran rilaton inter la scienca lingvistiko kaj la tradicia entrepreno leksikografia kaj gramatika. En ĉiuj modernaj socioj, la ŝtatoj kaj la eldonsistemoj oficiale mastrumas siajn lingvojn nur enkadre de tiu tradicia entrepreno. Mia opinie





tio nun nomata „interlingvistiko” devos forĝi novan identecon vidalvide al tiu ĉi ne ofte agnoskata krizo. *Pri la natureco kaj artefariteco de lingvoj kaj aliaj studoj* estas neglektita verko de la karmemora Vilmos Benczik, kiun ni nepre relegu, dum niaj Tezeoj serĉas ariadnajn fadenojn. Anstataŭ deziri por nia afero agnoskiĝon ĉe oficialaj lingvistikoj, ni traktu la krizan rilaton inter tiuj lingvistikoj kaj la socikulture oficialaj tradiciaĵoj. Kaj ni profitu de tiu krizo.

RP: Ĉu vi konsideras vin adepto de certa lingvistika aliro? Aŭ, en kiu el la lingvistikaj skoloj vi sentas vin (plej) hejme?


*PD: Mi fasonis por mia loĝado propran tendon. Troviĝas apud ĝi la tendoj de miaj aliancanoj kaj studentoj. Ni nomas nin „substancistoj” kaj fojfoje jarkunvenas en telefonbudo. (Ĉi tiun metaforon mi ŝtelis el iama karikature de Stefan MacGill en Kontakto.) Eblas legi *Loĝi en homaj lingvoj*, sed tiu manifesto estas eksdata: abundas rezultoj novaj. Mi baldaŭ artikolos prie en *Esperantologio/ Esperanto Studies*.*

RP: Kiajn spurojn lasis la tradicia barata lingvoscienco en la moderna lingvistiko? Kiel nuntempaj lingvistoj, barataj kaj aliaj, rilatas al ĝi?

PD: Mi verkis prie, sed nur angle: la respondo estas iom longa. Bv rigardi jenan blogan afiŝon: <https://wp.me/p2Aw52-4i>

RP: Oni ofte riproĉas al Esperanto „troeŭropecon”, pro kiu ĝi estas multe pli malfacila por, ekzemple, koreoj aŭ ĉinoj ol por hispanoj aŭ slavo. Kion pri lern(mal)faciligaj trajtoj de Esperanto por parolantoj de hind-eŭropaj lingvoj en Barato? Kaj por parolantoj de ne-hind-eŭropaj lingvoj en Barato?

PD: Mi konstatis ke baratanoj parolantaj diversajn lingvojn same pene aŭ senpene lernas Esperanton. Inter la parolantoj de hindeŭropaj kaj nehindeŭropaj lingvoj ene de Barato mi tiurilate ne rimarkis diferencon en mia sperto de pli ol kvindek jaroj.





RP: Ĉu estas demando, kiun mi ne demandis, sed al kiu vi ŝatus respondi?

PD: Ni supozu por momento, ke Esperanto treege longe restos en sia ne tre fortika niĉo en la ekosistemo de lingvoj en la mondo kaj ke la hegemonia rolo de la angla ne forvelkos. En tia perspektivo, kiamaniere ni laboru kaj varbu por Esperanto sen embarasiĝo?

Diversaj taktikoj allogos diversajn laborantojn. Mi mem en la 90aj jaroj evoluigis la sloganon „internocia lingvo”. Pro sia vortera strukturo (skribi, skribilo, skribilaro k.s.) Esperanto unike ligas ĉiun nocion al najbaraj nocioj. Tio igas ĝin brila edukilo lige kun la kogna kresko. Ni prezentu ĝin kiel internocian laborilon lingvo-tipan, kiu kreas ponton inter la matematika precizeco kaj la nur-etna-lingva nebuleco. La lernantoj havas diversajn fortojn kaj malfortojn. Iuj timas la matematikon sed flue funkcias sur la lingva tereno. Ni diskonigu la fakton, ke eĉ al matematikofobiuloj ne malfacilas Esperanto kaj ke ĝi malnebuligas la kapon en la lernejoj. Tio kompreneble estas nur unu taktiko. Necesos tuta repertuaro por diverstipaj agantoj.

Kunmetis: Radojica PETROVIĆ

Tuŝsenso kaj aliro al artĝuado

*de Aldo GRASSINI (Italio), prezidanto de Museo Tattile Statale Omero
(Retejo: www.museoomero.it en tri lingvoj: itala, angla kaj Esperanto)*

Tuŝsensa Muzeo Homero troviĝas en Ancona (Italujo). Ĝi naskiĝis en 1993 kaj fariĝis ŝtata en 1999 per leĝo unuanime aprobita de la itala nacia Parlamento.

En Muzeo Homero ne estas malpermesite tuŝi. Tio signifas, ke blinduloj tie rajtas vidi per-mane. Tie al ili oni ebligas travivi interesan kaj ĝojigan sperton per rekta kontakto kun mirigaj artaĵoj.

Jen estas maniero realigi efektivan kulturen intergrigon de homkategorio, la blinduloj, kiu fakte estas forigita disde grava kultura fako pro la ĝenerala malpermeso tuŝi muzeaĵojn kaj la neblo iel malpezigi tiun mankon per utiligo de fotoj kaj televidaj kaj kinaj filmaĵoj.

Muzeo Homero proponas skulptaĵojn, la ĉefajn majstraĵojn ekde la helena periodo ĝis nuntempo. La klasika skulptarto estas prezentita per perfektaj

IPR 21/4➤11





kopioj realigitaj el la muldaĵoj de la originalaj verkoj. Nuntempa arto proponas verkojn nur originalajn de italaj majstroj. Muzeo Homero havas ankaŭ belegajn maketojn science realigitajn pri multaj mondfamaj monumentoj.



Krom redoni al blinduloj la rajton koni arton, ĉu Muzeo Homero ankaŭ sukcesas transdoni al ili la emociojn de pure estetika ĝuado?

Pri tiu problemo oni diskutas de preskaŭ tri jarcentoj. La franca filozofo Diderot jam en la 18-a jarcento agnoskis, ke blinduloj povas per tuŝsenso koni konkretajn aĵojn, sed li dubis, ke ili ankaŭ aliras al estetika pritaksado.

La spertado akirita de Muzeo Homero tute forigis tiun dubon. Kaj la afero fariĝis pli interesa: tuŝsenso apartenas al ĉiuj, ne nur al blinduloj. La tuŝsensa aliro al arto malkovras novan kaj malmulte esploratan vojon al plena ĝuado de art-emocioj. Kaj ni prilaboras tute novan estetikon koncerne tuŝsenson.

Ĝenerale artĝuado postulas du elementojn: sensan kaj intelektan. Ambaŭ kreas plezuron, kaj ili perfekte intermiksiĝas.

Ĉiaj sensperceptoj povas esti agrablaj aŭ malagrablaj. Ili ĉiuj povas stimuli intelektajn reagojn: konceptojn, pensojn, emociojn, sentojn, rememoraĵojn, kulturajn reĥojn, kaj iliajn liberajn kombinaĵojn kaj





interrilatigojn. El tio fontas la intelekta plezuro de arto. Tio validas pri ĉiuj sensoj inkluzive de tuŝsenso.

Ĉiuj sensoj havas sian specifecon kaj tio validas eĉ por tuŝsenso. Vidpovo kaj tuŝsenso estas la nuraj sensoj kapablaj percepti la formon de fizikaj aĵoj; sed koloroj apartenas nur al vidsenso. Kiuj kvalitoj estas percepteblaj nur per tuŝado? Pezo, temperaturo, konsisteco kaj la vastega gamo de iliaj nuancoj. Ili estas samsubtilaj kaj variaj kiel la nuancoj de aliaj sensoj. Rava povas esti ampleksa kolorstrukturo ĉe pentrarto aŭ de sonstrukturo ĉe muziko, sed same rava estas esplorado de diversglata surfaco el diversmola materialo kaj diversvarma kontakto.

Sed karesumado produktas tre intensan afekcian reagon. Ne eblas ne karesi tion, kion ni amas! La okulo bezonas malproksimon; inter ĝi kaj la aĵo rigardata ĉiam estas malplena spaco. Sed la mano nuligas tiun malplenaĵon. Subjekto kaj objekto fariĝas unuaĵo.



Rekoni figuron per tuŝado postulas intelektan ekzercadon. Vidpovo estas sinteza, palpsenso estas analiza: ĝi devas image konstrui la bildon. Dek fingropintoj, kiuj perceptas po unu surfacan parteton, konstruas unu mensan bildon. Komparu tiun mensan funkcion kun puzlofara ludo.

La permana bildkonstruado estas pli malrapida, sed ĝi aktivigas la intelekton kaj trejnas pensadon. Palpesplorado kunigas plezurojn de ektuŝo kaj de mensgimnastiko krom esti tre emocianta.

Danke al Muzeo Homero blinduloj instruas vidantojn trovi perditan senson, kompreni, ke ekzistas ankaŭ aliaj vojoj por aliri belecon kaj arton, ne nur la vidpovo.

Kaj tion malkovris nuntempaj artistoj, kiuj multoble praktikas arton plursensan.

Antaŭ la pandemio Muzeo Homero ricevis jare ĉ. 35 mil vizitantojn; vasta plimulto estis vidantoj, kiuj entuziasme scivolas tian sperton. Lernejoj kaj universitatoj interesiĝas pri tiu fenomeno kaj multaj muzeoj jam komencis iel realigi tuŝeblajn itinerojn.





IKON - lingvo de ikonoj

de Teddy NEE (Tajvano) kaj Cesco REALE (Svislando)

Teddy Nee estas poliglota inĝeniero, jutubisto kaj komunikadresponsulo ĉe KomunIKON.

Cesco Reale estas ĉefrepresentanto de UEA ĉe UN en Ĝenevo, kun-organizanto de la Monda Poliglota Kunveno kaj fondinto de KomunIKON.



Desegnaĵo de Sandra STAUFER

Problemoj en skriba komunikado

Esti en fremda lando, kie vi ne bone legas la lingvon, povas esti malfacile. Surstrate, vi kutime povas vidi afiŝojn, afiŝtabulojn kaj ŝildojn, ĉiujn verkitajn en fremda lingvo, kiun vi ne bone komprenas. Ifoje povus timigi ne scii la mesaĝon malantaŭ ĉiuj tiuj vortoj en la fremda lingvo. Ĝi povas esti grava mesaĝo, kiel „Neniu eniru aŭ monpuno”, „Kontaktu 911 se vi bezonas helpon” aŭ „La policejo estas 100 metrojn de ĉi tie”. Miskomunikado ne okazas nur al vojaĝantoj, sed ankaŭ al aliaj homgrupoj, kiel elmigrintoj kaj migrintaj laboristoj. Kio okazas, se la miskomunikado estas pri pli grava situacio, kiel pri prevento de kovim-19? La registaro malfacile komunikas al tiuj, kiuj ne bone komprenas la lingvon uzatan de la registaro.





Propono por plibonigi skriban komunikadon per ikona lingvo

Grupo de volontuloj el Svislando kaj tutmondo komencis projekton, kiu nomiĝas KomunIKON (<http://www.komunikon.com/>) kaj disvolvas IKON, kiu estas internacia vida lingvo, en kiu multaj frazoj, vortoj kaj konceptoj povas esti esprimitaj per ikonoj, irante unu paŝon preter emoĝioj.

Uzoj

IKON povas esti uzata por reklamoj, sloganoj, en retejoj aŭ butikoj, kie ajn vi bezonas skribi mesaĝon al publiko, kiu ne havas komunan lingvon kun vi. Ikonoj estas uzataj por plibonigi la komprenivon de homoj, kiuj ne povas legi tiun mesaĝon aŭ ne havas kompletan komprenon pri ĝi, precipe infanoj, analfabetoj, migrintoj, turistoj kaj handikapuloj.

Karakterizaĵoj

La gvidlinioj kaj filozofio malantaŭ la kreo de IKON estas jenaj:

- Internacia: ikonoj devas esti kompreneblaj tra diversaj landoj kaj lingvoj.
- Inkluziva: piktogramoj devas respekti diversecojn, kiel sekso, seksa orientiĝo, etnoj, haŭtkoloroj ktp.
- Homcentra: la koncepto de „homo” estas prezentita en multaj ikonoj, kiel mi, vi, patro, patrino ktp. Estontece ni povus aldoni ikonojn por bestoj, plantoj, eksterteruloj kaj pli.
- Preciza: ĉiu ikono devas havi bone difinitan signifon, kiel en vortaro. Komparu „aŭdi” (maldekstre) kaj „aŭskulti” (dekstre) en la suba bildo.



- Kompleta: ĉiuj gravaj signifoj povas esti reprezentataj per almenaŭ unu ikono por ke homoj povu sin esprimi efike.
- Necenzurita: ne estas malpermeso de vulgaraj, sekse eksplicitaj, perfortaj kaj ofendaj ikonoj, kiel en iu ajn reala lingvo. Malpermesoj povas esti en la forumoj, ne en la lingvo mem. Ni ne volas esti kiel George Orwell-a Novlingvo en la romano *Mil naŭcent okdek kvar*.






- Kongrua: se ikonemo X havas certan signifon Y en ikono Z, la ikonemo X devas konservi la saman signifon Y en ĉiu ikono. (Ikonemo estas la minimuma parto de ikono kiu havas iun signifon, analogie al morfemo, fonemo ktp).
- Travidebla: ikonoj devas esti komprenataj kiel eble plej facile de plej multaj homoj.
- Amastestata: ikonoj devas esti provataj de la komunumo, ni uzas ilon nomatan ikonmezurilo, disvolvita de la Universitato de Ĝenevo.


Ekzemplaj frazoj

Ĉi-sube vi povas vidi iujn el la frazoj, kiujn ni ellaboris por niaj klientoj. Bonvolu memori, ke la IKON-lingvo estas tre fleksebla, do la gramatikaj klarigoj, kiujn ni proponas ĉi tie, celas montri iujn ideojn malantaŭ niaj ikonoj, sed ili ne estas rigidaj reguloj lernendaj, ĉiu povas uzi la lingvon laŭ sia prefero, se tio sukcesas komprenigi la ricevanton.

Jen frazo ikona, provu diveni ĝian signifon, antaŭ ol daŭrigi la legadon:



La signifo estas „KomunIKON serĉas vin!”. Unue, ni vidas la logotipon de KomunIKON kiel la subjekto, sekva estas unu persono kiu serĉas la bluan pilkon, kaj la lasta ikono signifas „vi”. Nun provu kompreni tiun duan frazon:



La ikonoj supre signifas „Mi amas aŭskulti muzikon”. En la ikono por „aŭskulti”, la mano emfazas la aktivan konduton de la aŭskultanto, dum la ikono por „aŭdi” (malpli aktiva ago) ne montras la manon.





Nun provu diveni la lastan frazon:



Miaj lingvaj limoj estas miaj mondaj limoj. Jen parafrazo de la fama frazo verkita de la filozofo Ludwig Wittgenstein: „Die Grenzen meiner Sprache bedeuten die Grenzen meiner Welt” (La limoj de mia lingvo signifas la limojn de mia mondo).

En ĉi tiu frazo „mia” havas bluan randon por indiki, ke ĝi estas adjektivo (poseda pronomo) kaj ne la pronomo „mi”.

La ikono „lingvo” reprezentas buŝan, skriban kaj signan lingvon; por signolingvo ni montras fingroliterojn anstataŭ verajn signojn de signolingvo, ĉar ĉi-lastaj estus pli malfacile reprezentebaj kaj kompreneblaj.

La ikono „limoj” havas duoblan randon por indiki pluralon.

Se vi volas malkovri plie, kunlabori kun ni aŭ kontakti nin, vizitu nian retejon www.komunikon.com.

La aventuroj de Saĝa Steleto kaj de la Mirinda Teamo kiel eduka animacio

de Alessandra MADELLA (Italio)

En oktobro 2021 jam preskaŭ 2800 homoj spektis la animacion en Esperanto „La aventuroj de Saĝa Steleto kaj de la Mirinda Teamo” en la jutuba kanalo de UEA, t.e. UEAviva. Temas pri samideana teamo de tri superherooj: Saĝa Steleto kun sia verda stelo kaj paca ĉielarka tapiŝo; la tre pova Verda Serpentino, kiu vivis pli ol mil jarojn parte home kaj parte serpente; kaj la vigla kaj kuraĝa Joga Bubo, kiu uzas la baratan tradicion



IPR 21/4➤17





arton por komuniki telepatie. Iliaj malamikoj estas krokodiloj, serpentoj kaj la belega Reĝino de la Nokto, kiu volas veneni la Parfuman Panteron de Dionizo por forviŝi la kulturan kaj biologian diversecon de la mondo. Grekaj dioj, ĉinaj legendoj kaj fantaziaj bestoj de la eŭropa mezepoko sekvas unu la alian en la rakonto. Per ĉarmaj roluloj kaj facile memoreblaj frazoj, la animacio klopodas tuŝi kelkajn el la plej gravaj temoj por Esperanto nun kaj samtempe prezenti la eblan pacan kunvivadon de malsamaj kulturoj kaj vivmanieroj. En tiu ĉi eseo, mi montros precipe kiel ĝi havis edukan rolon por la membroj de la Esperanto-Grupo „Giorgio Canuto” de Parmo, kiuj aktive kunlaboris por realigi ĝin, sed ankaŭ por la samideanoj de amikaj kluboj, kiuj helpis nin traduki ĝin al siaj lingvoj. Mi same opinias, ke ĝi povus kontribui al la lernado de Esperanto kaj al la varbado pri ĝi preskaŭ en ĉiuj partoj de la mondo.

Unue gravas la historio de ĝia kreado, kiu povas doni kuraĝon al multe da homoj kaj esti imitata fare de ili. Mi fakte realigis la animacion per senpage elŝuteblaj programoj, simpla komputilo kaj muso dum la plej malfacilaj monatoj de la pandemio. Tiam en Italio estis tre striktaj reguloj kaj ne eblis libere renkontiĝi kun aliaj homoj aŭ



instrui ĉeestajn lecionojn de Esperanto. En iu maniero, do, la animacio mem nature prenis sur sin tiun alimaniere neeban edukan rolon. Mi kutime invitis samideanon aŭ samideaninon viziti min individue hejme kaj montris la partojn, kiujn mi jam faris sur mia komputilo, por ke li aŭ ŝi povu havi pli klaran ideon pri la tuta laboro. Estis tre grave por mi vidi iliajn reagojn kaj aŭdi iliajn sugestojn. Kelkfoje ili eĉ havis spontanajn komenton aŭ ideon, kiu iĝis parto de la rakonto. Ekzemple, mia amikino Patrizia, kiu mem instruas jogon, plurfoje vizitis nin kaj multe kontribuis al la karaktero de tiu rolulo per siaj fakaj klarigoj kaj eĉ ŝercoj. Ŝia edzo, Fall Papa Ngalgou, aŭdinte de ŝi, ke mi interesiĝis pri afrikaj fabeloj, dum siaj laboraj vojaĝoj surbendigis por mi du longajn rakontojn laŭ maniero de senegalaj profesiaj rakontistoj. Ankaŭ tiu kultura kunlaboro iĝis grava fono de la animacio.

Kutime mi faris la desegnaĵojn nur post kiam mi sukcesis registri la voĉojn de la roluloj, por ke la bildoj pli bone akordiĝu kun la parolaj tempoj. Homoj sin ekzercis plurfoje diri la frazojn antaŭe kaj mi ofte ŝanĝis ilin, kiam





mi fine konstatis, ke ili estas tro malfacile prononceblaj. La rezulto de tiu laboro estas, ke la frazoj mem akiris plaĉan ritmon kaj estas facile memoreblaj. Mi opinias, ke tio multe kontribuas al la sukceso de la animacio kaj al ĝia uzebleco en instruado. Gravas ankaŭ la fakto, ke la itala prononco estas eble sufiĉe klara kaj komprenebla por multe da samideanoj en la mondo. Anna Löwenstein alŝutis mian animacion al sia retejo *uea.facila* kiel mez-facilan filmeton kaj multe ĝojigis min, kiam Luis Obando rakontis, ke studentoj jam uzas ĝin en Esperanto-kursoj por lerni novajn vortojn. Ĝi ne estas, fakte, animacio kreata per atenta gradigo de la vortprovizo, kiel estis ekzemple *Mazi en Gondolando*, unue elpensita por la anglaj kursoj de BBC. Sed ĝi havas kelkajn ecojn de la tiel diritaj „aŭtentikaj dokumentoj”, kiuj nun estas iĝantaj modaj en la instruado de la franca kaj la angla, ankaŭ por alkitimigi al la malsamaj postkoloniaj prononcoj, ĉiam pli gravaj en la labormerkato. Alia Esperanta animacio povus esti farota estonte se pensi pli multe en tiuj ĉi terminoj kaj kunmeti prononcojn de malsamaj lokoj eĉ pli ofte ol kiom mi faris por *Saĝa Steleto*. Esperanta prononco, neniam tute perfekta, estis ĉiam praktike invito al atenta aŭskultado de la aliaj kaj en tio ni povas ja vidi mond-gravan edukan avantaĝon, kompare kun la grandaj lingvoj, kiuj nur nun komencas konkrete atenti pri la problemoj.



Fine mi volas emfazi la gravan rolon, kiun tradukado de la subtitoloj de la animacio ludis kiel formo de edukado. La gestudentoj de panjo, kiuj estis ankaŭ la unuaj roluloj, unue tradukis la animacion al la itala. Temis pri hejmtasko kaj klas-ekzercado dum la Esperanto-kursoj. Poste la klubanoj de nia franca ĝemela klubo de Hérouville-Caen en Normandio faris por ni la francajn subtitolojn kaj la klubo de Saitama en Japanio helpis nin per la japanaj. En ĉiuj kazoj sekvis interesaj diskutoj kaj komparoj kun la itala kulturo, kiuj estis fascinaj kaj pensigaj por ni ĉiuj. Tiel montriĝis, ke estas loko por Esperanta animacio, kreita origine en la internacia lingvo per samideana kunlaboro, kiu povas prezenti ankaŭ iom profundajn ideojn, sed en maniero klara kaj akceptebla por multaj kulturoj. Tiu kunlaboro certe povas altigi la edukan valoron de mia animacio kaj eblaj similaj klopodoj.





„La Eta Krokodilo kaj la Verda Stelo” – Intervjuo kun *Cécilia & Maximilien Guérin*

de Alessandra MADELLA (Italio)



Cecilia kaj Maksimiliano Gverino lastatempe publikigis ĉarman du-lingvan libreton en la franca kaj E-o pri eta krokodilo, kiu, sek-vante verdan stelon, fuĝas el bestoĝardeno, amikiĝas kun birdego kaj kun la nova kunulo alvenas al urbo, kie por la unua fojo li vidas falantan neĝon. Publikigis ĝin la pariza eldonejo L'Harmattan, kiu havas

longan historion de kunlaboro kun E-o.

En tiu ĉi intervjuo, Cecilia kaj Maksimiliano afable konsentis respondi al miaj demandoj pri sia libro kaj estontaj projektoj.

Ĉu vi povas diri al ni ion pri vi mem?

Ni geedziĝis antaŭ pluraj jaroj. Cecilia estas instruistino en baza lernejo kaj mi [Maksimiliano] estas universitata esploristo pri lingvistiko.

Kial vi decidis verki libron por infanoj en Esperanto?

Ni volis krei originalan rakonton, kiu transdonas la Esperanto-valorojn. La ĉefa celo estis verki metaforan rakonton pri la Esperanto-historio. Ĉi tiu libro celis starigi transgeneracian ligilon inter Esperanto-parolantoj kaj iliaj infanoj aŭ nepoj.

En la kolekto de L'Harmattan-Jeunesse estas ankaŭ aliaj libroj en du lingvoj. Kiel vi pensas pri tio, ke dulingvaj libroj estas iĝantaj tiel modaj nun?

Fakte, ni ne pripensis tiun fenomenon. Sed, estas bone, ĉar tio permesas estigi pli da diverseco.



Kial, laŭ vi, dulingvaj libroj estas precipe gravaj por Esperanto?

Tiaj libroj povas esti gravaj por la lernantoj (kiuj lernas E-on aŭ kiuj lernas la francan). Ili ankaŭ povas esti utilaj por daŭrigi la ligilon inter pluraj generacioj de E-parolantoj.

Kiun ideon vi pensas, ke L'Harmattan volas prezenti per tiu ĉi kolekto?

Nur la eldonejo aŭ la kolektestro povus klare respondi al tiu demando. Laŭ la prezento de la kolekto: „Por la junularo, ni adoptas kreeman, noveman pedagogion..., sed ni ankaŭ celas poeziajn rakontojn, novajn aspektojn..., sen didaktika pretendo.”

Mi vidis, ke Maksimiliano, interalie, tradukis „La Eta Princo” al la volofa lingvo (kiu estas parolata ĉefe en Senegalo, Gambio kaj Maŭritanio). Kiel viaj antaŭaj spertoj en tradukado kaj eldonado helpis vin por „La Eta Krokodilo kaj la Verda Stelo”?

Fakte, la laboroj estas tre malsamaj, estas malfacile kompari la tradukadon de „La Eta Princo” al la volofa lingvo kun la verkado de „La Eta Krokodilo kaj la Verda Stelo”. Tamen, miaj antaŭaj spertoj pri libro-verkado kaj la rilatoj kun eldonejoj iom helpis nin. Estis pli facile trovi eldonejon kaj interparoli kun ĝi.

Kiel estas la kunlaboro inter artistino-literaturistino kaj lingvisto pri libro por infanoj?

Nia kunlaborado estis interesa, sed iom ĥaosa. Ni ekvidis, ke niaj labormanieroj estas malsamaj. La „maturiĝtempo” de Cecilia estis pli longa, dum mia laborado estis pli koncentrita. Ni ŝatis konfronti niajn respektivajn emojn por atingi komunan projekton.

Kiun artan stilon vi elektis por la ilustraĵoj?

Mi [Cecilia] ne antaŭvidis elekton. Mi provis plurajn stilojn kaj teknikojn. Mi emas naivan arton, do la desegnaĵoj sekvas kelkajn principojn de tiu stilo. La libro estas filozofia fabelo, do la stilo de la ilustraĵoj akordiĝas kun la rakonto. Fakte, la bildoj havas du perceptoniveleojn: oni povas pensi, ke infano faris ilin, sed ili estas desegnitaj de plenkreskulo. Estas la samaj niveloj en la rakonto: fabelo por infanoj, sed ankaŭ alegorio de la Esperanto-historio por plenkreskuloj.





*Estas amuze, ke vi elektis etan krokodilon, kiu trovas esperon en verda stelo.
Kiel vi ekhavis la ideon pri la rakonto?*

Fundamente, ni volis verki libron, kiu rakontas la historion de Esperanto. Kadre de tio, La Eta Krokodilo, la Verda Stelo kaj pluraj aliaj rakonteroj havas metaforajn valorojn. La vojaĝo de La Eta Krokodilo simbolas la historion de la movado ĝis la forpaso de L. L. Zamenhof.

Kion la neĝo signifas en via rakonto laŭ vi?

La neĝo signifas multe da aferoj, laŭ la legadnivelo. Unue, ĝi povas simboli la iom frenezajn revojn. Ĝi ankaŭ elvokas Varsovion. La unuiĝo de la neĝeroj simbolas la solidarecon inter popoloj; ĉi tio estas la celo de La Eta Krokodilo fuĝanta el la bestoĝardeno. Aliaj legantoj povus vidi aliajn aĵojn, alimaniere percepti ilin. Tio estas la intereso de naŭva rakonto: ĉiu povas eltiri la profundecon, kiun li aŭ ŝi ŝatas, ĉiu estas libera vidi siajn proprajn simbolojn.

Kiom grave estas pretigi poeziemajn rakontojn por Esperanto-parolantaj infanoj?

Estas tiaj rakontoj, kiuj kortuŝis min, kiam mi [Cecilia] estis infano. Mi ŝatis rakontojn kun naŭva kaj sonĝa mondo aŭ vojaĝo. Ni deziris krei ion por redoni tiun emon al Esperanto-parolantaj infanoj.

L'Harmattan havas longan historion de kunlaboro kun Esperanto. Kiel grava estis tiu ĉi konscio por vi kaj por la eldonejo?

Ekde la komenco de nia projekto, ni deziris eldonigi la libron per tiu eldonejo pro tiu estinteco. Ni estas feliĉaj, ke ili akceptis publikigi ĝin.

Kiel grave estis por vi prezenti ion pri Esperanto mem ĉe la fino?

La celo estis permesi al la legantoj pli facile vidi la simbolaron de la libro. Tio permesis al la ne-Esperanto-parolantoj kaj al la infanoj lerni parton de la movada historio.

Mi ŝatis vian prezenton de „Esperantio”. Kiel vi decidis verki ĝin tiel?

Ni celis koncizigi la historion de la komenco de Esperanto, aperigante la eventojn, kiuj ŝajnis al ni la plej memorindaj; eventoj, kiuj estis metafore reprenitaj en la rakonto. Ni volis ne tro longan tekston, sed sufiĉe klaran.

Kion vi esperas, ke infanoj prenu, ĝuu kaj memoru el via libro?

IPR 21/4➤22





Unue, ni esperas, ke ili memoru agrablan tempon de legado. Ni plie esperas, ke ili identiĝu kun la krokodilo, kaj ke ili estu kortuŝitaj de la valoroj de solidareco, amikeco, libereco kaj espero. Tiu rakonto povas esti revigema. Ĝi ankaŭ celas veki, inter ne-Esperanto-parolantoj, intereson por Esperanto.

Kiel tiu ĉi libro povus esti uzata por Esperanto-instruado?

Tiu ĉi libro permesas ellabori lingvajn kompetentecojn. Pri la komprenado, la dulingva teksto permesas adaptiĝi al la diversaj niveloj de la lernantoj. Ekzemple, oni povas imagi, por komencantoj, uzi nur la ilustraĵojn, kaj la instruisto diras/legas nur unu frazon por rakonti tion, kio okazas. Por mezniveluloj, oni eble povas plilabori la Esperanto-tekston, rilate al la franca versio. Por altniveluloj, oni povas labori pli pri la stilo aŭ la literatura parto de la libro.

Koncerne paroladon (kaj skribadon), oni povas proponi simpligitan reesprimadon de la teksto, ĉar la ilustraĵoj povas subteni la memoradon. Plie, ĉar la naiva stilo taŭgas, oni povas sin demandi pri la deziroj de la roluloj. La instruisto ankaŭ povas uzi la libron por labori pri emocioj.

Pri konversacio, la instruisto povas proponi ludi la dialogojn, ĉu skeĉe, ĉu pli simple uzante (paperajn) pupojn de la libroroluloj.

Fine, la libro povas esti uzebla por prezenti kulturajn aspektojn de Esperanto al lernantoj.

Ĉu vi ŝatus fari plian libron kune?

Jes, ni jam pripensis la ideon. Tamen, ni certe havos alian labororganizon por akordigi niajn malsamajn labormanierojn.

Kiuj estas viaj projektoj? Ĉu ankaŭ ili rilatas al Esperanto?

Nia sekvonta projekto estus ankaŭ dulingva libro (Esperanto-franca). Nia kato estis ĵaluza pro nia elekto de krokodilo. Do, eble estus rakonto pri nigra kato...

Ĉu vi volas aldoni ion, pri kio mi ne parolis?

Ni deziras belan kaj agrablan momenton de legado al ĉiuj, infanoj kaj plenkreskuloj. Ni esperas, ke vi estos kortuŝitaj de la mondo de la libro. Bonan vojaĝon kun La Eta Krokodilo!





El la landoj kaj sekcioj...

Francio

La 7-a Esperanto-staĝo en METABIEF - 15.8 - 21.8. 2021

La staĝo, organizita, same kiel la lastan jaron, de la klubo „Esperanto Chalonnois” sub la gvidado de Anne-Marie Ferrier, okazis meze de aŭgusto 2021-a en la vilaĝo Métabief. Ĉar la koronvira pandemio daŭris kun pli rigoraj kondiĉoj, la partoprenantoj devis havi sanatestilojn por havi permeson partopreni en la aranĝo. Kunvenis 25 geesperantistoj, plejparte francoj el diversaj regionoj kaj unu geedza paro el Svislando. Bona ideo estis, ke ĉiu alportis ion el sia regiono. Do, dum la kafopaŭzoj ni povis ĝui diversajn frandaĵojn kaj aperitive ni gustumis plurajn specojn de vinoj kaj fromaĝoj. Bongustis ankaŭ prunoj el nia ĝardeno. Ĉiutage ni bone kaj ĝissate manĝis.

Kiel kutime, matene kaj antaŭ la vespermanĝoj okazis E-kursoj. Michel Dechy instruis ĉefe pere de bild-rakontoj, bildoj kaj gazet-artikoloj. La lernantoj ŝatis roli en la aventuroj de Tinĉjo en Tibeto, la preferata albumo de Hergé mem. Michel Dechy prezentis Esperanton en VTF (Vilaĝo, Turismo, Familio) antaŭ dudeko da gejunuloj kaj gepatroj. Ankaŭ pluraj esperantistoj ĉeestis la prelegon. La unuan vesperon li prezentis la verkon de Hergé, serion de 24 albumoj de la *Aventuroj de Tinĉjo kaj Miluĉjo*.

Jacqueline Poux instruis aparte al du virinoj, kiuj jam havis bazajn sciojn pri la lingvo, sed kiuj deziris perfektigi pri Esperanto.

La konversacian E-kurson gvidis Catherine Kremer. Ŝi mem priskribis la manieron prezenti sian kurson: *Mi zorgis pri la kurso B. Mia rolo estis paroligi la partoprenantojn. En mia grupo ĉeestis ok interesatoj. Paroligi homojn ne ĉiam estas facile. La unuan tagon ni prezentis nin: kiu mi estas, de kie mi venas, kion mi ŝatas fari (hobiojn), kio estas mia profesio... Tre rapide la homoj interparolis. Mi tutsimple petis, ke ili prezentu al ni temon, kiun ili plej ŝatas.*

Kiu parolis pri kio: *Max donis al ni pikardan recepton - mi notis ĉion kaj provos fari ĝin hejme! Paŭlo prezentis al ni la metodon por krei ĉampanon. Belege! Ĉefe, ke li alportis ĉion (t.e. ĉampanon kaj rozkolorajn biskvitojn el „Reims”) por ke ĉiuj profitu bonegan aperitivan! Thérèse parolis al ni pri sia infaneco rolante kiel „fratino Paŭlino”. Christian rakontis al ni kiamaniere li transformis simplan urban ĝardenon en fruktodonan legomĝardenon. Ni nomis la diversajn ilojn, la legomojn ktp. Tre kortuŝa priskribo de „Constantine” en Alĝerio faris Jeanine helpate de Josiane. Ili vojaĝigis nin en apartan etoson. Unu rakontis, la alia desegnis la mapon de*

IPR 21/4➤24





„La Roko” kun la pontoj ktp. Isabelle klarigis al ni, kial „Paray-Le-Morial” estas vojo al paradizo. Ŝi parolis al ni pri „Notre-Dame de Romay”. Jean-Paul rakontis pri sia unua renkonto kun Esperanto. Bernard intervenis por paroli pri la projekto „Common Voice”. Floreal kaj Liba alvenis iom pli poste. Liba, kiel kutime, fotis kaj Floreal fariĝis nia kontrolisto pri la bona uzo de kelkaj vortoj - ni ne plu bezonis vortaron! Mi vere dankas al la tuta grupo! Mi denove multe lernis danke al ĉiuj kaj en agrabla etoso.

Post la tagmanĝo okazis piedirado en la montaro Ĵuraso, vizitoj de la kastelo *Le Château de Joux*, de mueleja muzeo, de distilejo en *Pontarlier* kun gustumado, de ekspozicio pri fabrikado de fromaĝoj kaj veturado per turisma trajno.

Vespere ni ludis tabloludojn kaj dancis. Dieter Rooke rememorigis la 100-jariĝon de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) kaj Martine Demouy prezentis bildojn kaj rakontis pri vizito al la regiono de Fukuŝima kaj montris la domon de esperantistoj *Jacugatake*.

Ĉiuj estis kontentaj kaj tre feliĉaj povinte denove renkontiĝi kaj ĝui agrablan semajnon en tiu montara loko de la ĵurasa regiono. Dankon al la organizantoj!

Liba GABALDA

Hungario

Premio Degučî 2021 al Stefan MacGill, iama prezidanto de ILEI

Per decido de la Estraro de UEA, la Premio Degučî de la jaro 2021 estas aljuĝita al: **Stefan MacGill**.

Stefan Clive MacGill naskiĝis la 5-an de oktobro 1948 en Nov-Zelando, tamen ekde 1986 li vivas en Hungario. Stefan lernis Esperanton denaske de sia patro, David MacGill, kiu instigis al sia patrino eklerni la lingvon. Liaj tri filinoj parolas Esperanton; do temas pri kvar-generacia esperantisteco en la familio.

Profesia esperantisto

Stefan studis pri la fako geografio en Nov-Zelando kaj en 1974 li akiris instruistan diplomon por instrui en elementaj lernejoj. En 1976 li translokiĝis al Roterdamo por volontuli en la **Centra Oficejo** (CO) de UEA. De 1977 ĝis 1986 li laboris kiel oficisto, de 1980 ĝis 1984 kiel la direktoro de la CO. De 1976 ĝis 1986 li estis redaktoro de la *Jarlibro* de UEA. Krome, de 1978 ĝis 1986 li estis ankaŭ teknika redaktoro de la revuo *Kontakto*. De 1986 ĝis 1996 kaj denove inter 2000 kaj 2013 li redaktis la gazeton *Juna Amiko*. En 1989 li komencis profesie okupiĝi pri verkado de help-tekstoj por komputilaj

IPR 21/4➤25





programoj; en 2012 li emeritiĝis, sed lia sperto plu speguliĝas en la diversaj gvidiloj, kiujn li daŭre produktas por la Esperanto-movado.

Longjara internacia aganto

Stefan kunfondis la Esperantan Junularan Asocion de Nov-Zelando, en 1964. Li poste prezidis aŭ vic-prezidis tri el la plej grandaj Esperanto-organizaĵoj: en 1977 li fariĝis vicprezidanto kaj sekve, en 1979 kaj 1980, prezidanto de **TEJO**. Lia ĉefa projekto dum 1980 estis la realigo de la unua seminario de TEJO, kiu ricevis financan kaj organizan subtenon de la Eŭropa Junulara Fonduso (EJF). Post tio okazis regule multaj dekoj da subtenataj seminarioj, kiuj kune envenigis al TEJO multajn centojn da miloj da eŭroj. De 1989 ĝis 1992 li estis vicprezidanto de **ILEI**, de 1992 ĝis 1994 kaj denove inter 2009 kaj 2013 li estis prezidanto de ILEI. Elektita en 2013 kiel vicprezidanto de **UEA**, li estis reelektita en 2016 por dua trijara oficperiodo. Inter januaro kaj marto 2017 li ankaŭ estis provizora redaktoro de la revuo Esperanto. En 2019 li estis elektita komitatano C en la Komitato, posteno, kiun li okupos ĝis aŭgusto 2022.

Nemava verkisto

Krom la riĉa agado kiel aktivulo, Stefan estas ankaŭ verkisto: <https://mallonge.net/MacGill>. Sub lia nomo aperis „*Tendaraj Tagoj*”, „*La Laŭta Vekhorloĝo*”, „*Tridek Roluloj*”, „*Streĉ' eĉ, Steĉj-skeĉ'!*”, „*Pordoj*”, „*Okulo*”, „*Nemave Edif*” (FEL, 2007), la teatraĵo „*Aŭto-mato*” (Beletra Almanako, n-ro 2, 2008) kaj aliaj.

Senlaca organizanto

Ekde la ĉesigo de la papera Jarlibro de UEA en 2019, Stefan okupiĝas pri la arigo de informoj, kiun UEA devus transdoni kiel same per la Jarlibro. Li tenas kontaktojn kun ĉiuj landaj kaj fakaj asocioj de UEA kaj landaj sekcioj de ILEI kaj TEJO. Pro tiu agado li estis nomumita de la Estraro de UEA komisiito pri Rilatoj kun Membro-organizoj (Landa Agado), laboro, kiun li elstare plenumas. La arigo de informoj rezultigis serion de dokumentoj nomatan Landa Parad', dividitaj laŭ mondopartoj. La aktualaj versioj de tiuj dokumentoj estas en la „Retejo por Aktivuloj” de UEA (aktivulo.net). Krom tio Stefan ankaŭ agis kiel komisiito pri Aktivula Maturigo (AMO), zorgante pri pluraj dekoj da AMO-seminarioj. Li ankaŭ respondecas pri EKO (Esperigaj Komunikoj), serio de komunikoj de la Esperanto-Movado.





Meritoplena ricevanto de la Premio Deguĉi


Temas pri strukturaj agadoj, kiuj fortigas kaj tenas la reton inter diversaj instancoj de la movado, ekde individuoj ĝis asocioj. Pro tiomaj sindediĉo kaj Esperanto-kariero li estas meritoplena por la Premio Deguĉi.

Noto: enhavo adaptita el la Esperanta Vikipedio: 300 000+ artikoloj en 2021.

Fonto: Gazetaraj Komunikoj de UEA. N-ro 970

Italio

Marŝado por Paco kaj Frateco



La 10-an de oktobro, hom-torento, ĉirkaŭ 30.000 personoj (kaj ankaŭ kelkaj hundoj ☺), venantaj el la tuta Italujo kaj multaj eĉ el eksterlando, malgraŭ la timo de la pandemio, prenantaj la necesajn singardaĵojn, partoprenis en la Marŝado por Paco kaj Frateco. Amasa partopreno, precipe de junuloj, lokaj aŭtoritatoj kaj asocioj.

De la ĝardenoj de la Frontono de Perugia, kie Aldo Capitini*, antaŭ 60 jaroj, la 24-an de septembro 1961, organizis la unuan Marŝadon, ankaŭ ĉi-jare serpentumis, ĝis la Rocca Maggiore de Assisi-Asizo, 24-25 km-oj de marŝado.

Do la Marŝado okazis de la naskiĝloko de Capitini ĝis tiu de Sankta Francisko**. (Kompreneble estis tiuj, kiuj preferis malpli longan irvojon kaj ekiris de la Ponto St. Giovanni aŭ, eĉ pli mallongan, de Bastia Umbra).

„Mi prizorgas” („I care”) „elverŝi, adapti mian koron al aliaj”. Ĉi tio estas la „slogano”, kiun la organizantoj elektis por la Marŝado de la Paco 2021. Kial? Ĉar necesas sindevigo de ĉiuj por solvi la gravajn problemojn, kiujn ni nun havas kaj kiuj prezentiĝas minace ĉe la horizonto.

IPR 21/4➤27





Ni aliĝu kaj prizorgu la aliajn, la rajtojn de ĉiu vivanta estulo, precipe de la novaj generacioj, de la lernejo, de la komuna bono, de la plej malriĉaj kaj vundeblaj, de la naturo, de nia planedo por mildigi la klimatajn ŝanĝojn...

La prezidanto de la Itala Respubliko, Sergio Mattarella, en mesaĝo al Flavio Lotti, kunordiganto de la iniciata komitato de la Marŝado, deklaris: „La Marŝado de Paco Perugia - Assisi denove estas signo de espero. La valoroj, kiuj ĝin inspiras, kaj la partopreno, kiun ĝi denove stimulas, estas valoraj rimedoj en nia tempo de ŝanĝoj, sed ankaŭ de respondeco ... „.



* Aldo Capitini (Perugia-Peruĝo 1899.12.23-1968.10.19) estis filozofo, politikisto, kontraŭ-faŝisto, poeto kaj edukisto. Li estis unu el la unuaj, en Italujo, kiuj komprenis kaj teoriigis la neperfortan penson de Gandhi, tial li estas nomita „la itala Gandhi”.

** Sankta Francisko (Assisi-Asizo, 1182-1226.10.03), patrono de Italujo, estas konata kiel „Poverello di Assisi” t.e. „Malriĉulo de Asizo”, pro sia elekto seniĝi je ĉiu materia posedaĵo. Danke al la „Cantico delle Creature” t.e. „Kantiko de la Kreitaĵoj” li estis ankaŭ unu el la pioniroj de la itala literatura tradicio. Filo de komercisto, li estis gaja kaj ege verva junulo, kiu revis pri grandaj aferoj por sia estonteco kaj serĉis gloron per militaj entreprenoj, ĝis li komprenis devi servi nur la Sinjoron, kiun li renkontis en la malriĉuloj. Forlasinte la familion kaj ĉiujn havaĵojn, li predikis la Evangelion kaj travagadis Italujon. Li vizitis Egiptujon por renkonti la tiaman sultanon por dialogi kun li. En Italujo alkuris multenombraj homamasoj kaj disĉiploj, kiujn li nomis fratoj. Li fondis tri franciskanajn ordenojn.

Filomena CANZANO





Japanio

Interesa kaj imitinda strategio por praktiki Esperanton

Mireille Grosjean prezentas la japanstilajn sabatajn kunsidojn.

Ni ĉiuj devas ne nur lerni la lingvon, sed ankaŭ praktiki ĝin, uzi ĝin parolante kaj aŭdi ĝin por pli bone kaj pli rapide kompreni ĝin, kaj tiel akiri kapablon interveni en diskutoj kaj debatoj. En Tokio esperantistoj kutimas kunveni unufoje monate en la sidejo de Japana Esperanto-Instituto en Waseda, tamen nun la kunsidoj okazadas rete. Tio ebligas al eksterlandanoj partopreni.

La ideo de tiuj progresigaj kunvenoj venas de la profesia interpretisto s-ro Yamakawa. Plej diversaj esperantistoj partoprenas, de komencantoj ĝis flue parolantaj esperantistoj. Ĉiu persono kun intenco partopreni povas anonci titolon kaj prezenti tiun temon dum 5 ĝis 15-minuta parolado. Aliaj partoprenantoj volas nur aŭskulti.

Evidente debato ekas post la fino de ĉiu prezento, aŭdiĝas demandoj kaj respondoj. Do la partoprenantoj sentas sin liberaj aktivi aŭ pasive sekvi la du horojn kaj duonon; ne okazas ia korektado de eraroj, ne temas pri kurso, gramatiko ne aperas en la temoj. La etoso estas gaja kaj pozitiva. Min ĉefe interesas – kaj tion mi volas diskonigi al vi, karaj legantoj de IPR – la libereco de la partoprenantoj: ĉu mi volas prezenti ion, se jes, mi devas prepari min, tamen la daŭro ne estas longa.... Do ek al parolado!

En la suba raporto de s-ro Yamakawa li rakontas pri partopreno de 14 personoj. En la aliaj kunvenoj mi renkontiĝis foje kun 20 personoj. Legu, kiel sinjoro Yamakawa priskribas sian funkcion: „Por progresintoj en Japanio mankas okazoj paroli Esperanton, do mi simple disponigas lokon, en kiu ili povus fari ĝuste tion.”

Jen raporto de la organizanto sinjoro Yamakawa:

Rete okazis ankaŭ la oktobra Sabata Kunsido la 9-an de la monato. Partoprenis 14 personoj, inkluzive de 5 el eksterlando. La prelego de Mirejo pri la „Nunaj malfacilaj rilatoj inter Svislando kaj Eŭropa Unio” estis tre kleriga por japanoj preskaŭ ne informitaj pri tiu mondoparto.

Nia amiko el Pollando, Jerzi, parolis pri „Assisi, la urbo de la ĉi-jara Itala Kongreso de Esperanto” kun multaj belaj fotoj. Profesoro Kimura, portempe loĝanta en Germanio, diskutis pri „Metodoj de Interlingva Komunikado” surbaze de la samtitola libro ĵus eldonita de la eldonejo Taishukan.



La translandlima magiisto Hiro Fukuda prezentis vivan plenumadon de „Balon-arto” kaj kaptis la atenton de etaj familianoj de niaj eksterlandaj partoprenantoj.

Mi, la prizorganto de la kunsido, skize raportis pri la kompletigo de la „11-a marŝado laŭ la vojo Tokajdo”. Tiel ni plene ĝuis 2.5 horojn tut-Esperante.

Por detaloj kontaktu: YAMAKAWA Syuiti <shu@gol.com>

Kroatio

Esperanto en Kroatio



Inter la 12-a kaj 16-a de aŭgusto 2021 en Đurđevc, en ĉasista domo, okazis la unua ĉeesta kunveno de partneraj organizaĵoj, kiuj partoprenis en Erasmus+-projekto „Reta edukado nun”. Partoprenis dudeko da personoj el Britio, Francio, Germanio, Hispanio, Nederlando, Hungario, Italio kaj Kroatio.



IPR 21/4➤30





Kunordiganto de la projekto estis Białostockie Towarzystwo Esperantistow el Bjalistoko, Pollando; partneraj organizaĵoj estis Bunta Esperanto-Asocio el Bolonjo, Italio, Kosmo Strategio el Edinburgo, Britio, Centre Culturel Esperanto el Tuluzo, Francio kaj Dokumenta Esperanto-Centro el Ĵurĉevac, Kroatio. Malgraŭ tio, ke la projekto komenciĝis en decembro 2020 kaj daŭros ĝis la fino de majo 2022, ĝis nun oni okazigis, pro la pandemio, nur retajn kunvenojn, partneroj kunvenis ĉeeste la unuan fojon en Ĵurĉevac.

La programo konsistis el prelegoj pri arkivoj, arkivado kaj ciferecigo de arkivaj materialoj, preparado de retaj libroj kaj broŝuroj.


Per amika diskutado pri la temo de la projekto kaj preparado de sekvonta kunveno en Bjalistoko en decembro 2021 finiĝis la kunveno.

„Bjelovaraj Esperantistoj al Sia Urbo” - promocio de poemkolekto de Željko Sabol

La naŭa kunveno de esperantistoj nomata „Bjelovaraj Esperantistoj al Sia Urbo”, estis dediĉita al la 80-a datreveno de la naskiĝo kaj 30-a datreveno de la morto de la konata bjelovara kaj kroata poeto, Željko Sabol. Por tiu temo estis ankaŭ grava kialo: Željko Sabol kaj lia patro estis membroj de Bjelovara Esperanto-Asocio kaj gvidis multajn kursojn en elementaj lernejoj kaj mezlernejoj.

Omaĝe al Željko estis starigita ekspozicio en la Urba Popola Biblioteko Petar Preradović kaj en la sama biblioteko estis promociita libro *Elektitaj Poemoj*, kun 25 poemoj de Željko Sabol, tradukita de Josip Pleadin. Inter ili estis la fama poemo: Kiam mi eldiris vian nomon. La libron finance apogis la Bjelovara-Bilogora Departemento.

En la sama biblioteko oni prezentis projekton: *Promocio de Esperanto inter gejunuloj*. La celo estis konatigi gejunulojn kun Esperanto, specife en la elementaj lernejoj kaj mezlernejoj, ĉar





Esperanto estis proklamita kiel nemateria kultura heredaĵo de Kroatio de Unesko.

Alia projekto estis: *La pasporto tra la Zeoj en Kroatio*. Finance apogis ĝin la urbo Bjelovar. Ekspozicio pri ili estis en la unua etaĝo de la biblioteko. Per ĝi oni deziras krei liston de Zeoj (Zamenhof/Esperanto-Objektoj) en la lando kaj eldoni gvidlibron, por ke esperantistoj, vizitante Kroation, povu viziti ilin. Tio estis la Tago de la Urbo kaj esperantistoj havis gravan parton en ĝi.

Marija JERKOVIĆ

Pollando

La internaciaj Interlingvistikaj studoj de UAM en nova formo

La eksteraj postdiplomaj *Interlingvistikaj Studoj* jam de 23 jaroj funkcias en la pola Universitato Adam Mickiewicz (UAM aŭ AMU), en Poznań, Pollando. Ili dum 3 jaroj formas profesiajn esperantologojn, interlingvistojn kaj Esperanto-instruistojn. Entute 142 homoj el la plej diversaj landoj kaj aĝgrupoj komencis siajn studojn en la antaŭaj 7 grupoj, kaj iom pli ol la triono finis ilin pretigante finlaboraĵon. Do preskaŭ 50 diplomlaboraĵoj naskiĝis dum la vivo de la Studoj, kiuj grandparte troveblas en Edukado.net, el parto rezultis revu artikoloj, kaj pluraj eksstudentoj aktivas en la movado. La 8-an fojon – pro la pandemio – la unua sesio okazis en **hibrida formo**, inter la 21-a kaj 25-a de septembro 2021, surloke partoprenis 20 studentoj.



Rektoro Witkowski salutas studentojn





Ĝis la sekvasemestra unusemajna renkontiĝo okazas ankoraŭ dufoje semajnfinaĵaj virtualaj sesioj, kiuj ebligas la inviton de eksteraj prelegantoj, prezentadojn de la gestudentoj, diskutadon kaj ekzercadon pri la traktataj temoj. Inter la 23-a kaj 24-a de oktobro 2021 okazis la oktobra reta kunveno per Zoom.

La nuna grupo estas eksterordinara pro sia grandeco kaj multnacieco: **41 partoprenantoj el 21 landoj**. Dudek studentoj venas el naŭ ekstereŭropaj landoj (Brazilo, Ĉilio, Ĉinio, Indonezio, Irano, Koreio, Kubo, Pakistano, Vjetnamio). Interese kaj honorige estas por la Studoj, ke ankaŭ *Margaret Zaleski-Zamenhof*, pranepino de *Ludoviko Zamenhof*, partoprenas en la Studoj.

La multlingva konsisto de la grupo estas elstara bazo por interkulturaj kaj interlingvaj komparoj tra Esperanto, kio jam komenciĝis dum la kursoj pri **Esperanta kulturo** kaj **Fonetiko**. La unuan kurson gvidis *Ilona Koutny* prezentante la vastan gamon de kulturo, de artaĵoj ĝis la ĉiutaga kulturo, de realaĵoj ĝis pensmaniero. La partoprenantoj kune malkovris la kulturan ligitecon de lingvoj surbaze de ekzemploj el siaj lingvoj. Temis ankaŭ pri Esperanta radiofonio danke al la konata spertulino de la tereno, *Barbara Pietrzak*, kaj pri Esperanta teatro danke al *François Lo Jacomo*, kiu mem iam aktoris. *José Antonio Vergara* (rete ĉeestanta studento), antaŭa prezidanto de ISAE (Internacia Scienca Asocio Esperantista), parolis mallonge pri scienca agado.

Dum la oktobra kunveno la ĉefan rolon ludis la **multkultura studentaro** prezentante gravajn kulturaĵojn, lokojn kaj eventojn en Esperantio pri kiuj ili mem havas sperton: Radio Havano Kubo (Ariadne Garcia Gutierrez, mem kunlaborantino), *La Brita Esperantisto* (Tim Owen, la redaktoro), brazilaj E-gazetoj (Manuela Burghilea kiu nun esploras ilin en Brazilo), la Esperanto-Muzeo en Zaozhuang (Li Xin el Zaozhuang, Ĉinio), simileco inter la ideologio de Esperanto kaj la indonezia lingvo (Arya Ferduzi el Indonezio), la fama esperantista verkisto Laŭlum (fare de lia iama lernantino YU Jianchao), Esperantaj arto kaj muziko (Benoît Stasiaczyk, mem muzikisto, franco vivanta en Ĉinio). *Jukka Pietiläinen* (Finnlando) kiel gastpreleganto skizis la historion de Esperanta gazetaro kaj elstarigis la plej signifajn.

La kurso pri **Fonetiko**, gvidata de *Nicolau Dols* (profesoro en la Universitato de Balearaj Insuloj), prilumis la mondon de parolsonoj, la manieron, kiel ni parolas, kiuj estas la specifaj trajtoj de Esperanto kaj kiel ilin analizi (la partoprenantoj povis lerni kiel uzi la sistemon Praat).

Komunikado povas okazi parole, skribe, nuntempe ofte elektronike kaj ankaŭ nelingve. Post la skizado de la kursa temaro de *Ilona Koutny* la





partoprenantoj povis prezenti ekzemplojn de la nelingva komunikado en diversaj landoj kaj provi diveni la signifon de aliulaj gestoj, mienoj kaj korpoteniĝoj. En oktobro okazis interesaj studentaj prezentoj pri komunikado de: hundoj (Lisa Bannier el Francio), katoj (Harry Baron el Britio); pri metakomunikado en Ĉinio kaj aliaj aziaj landoj (Arko: GONG Xiaofeng), diferenco en nomuzado inter orientaj kaj okcidentaj landoj (surbaze de pridemandado Ĝojo: Hoan Thi Tran el Vjetnamio); komunikado inter kuracisto kaj paciento (fare de kuracistino, Margaret Zaleski-Zamenhof el Francio). Kadre de amaskomunikado la reta komunikado ricevis specialan atenton (Mila Kolka el Ĉeĥio).

La unuan periodon de la **Esperanta literaturo**, gravan parton de Esperanta kulturo, analizis la rete preleganta *Tomasz Chmielik*. En oktobro kiel gastpreleganto *Humphrey Tonkin* parolis pri la poezio de la unua periodo kaj entute pri la rolo de Esperanta literaturo en la stabiliĝo de la lingvo. La interesan prezenton sekvis vigla diskutado.

La okazigo de la hibridforma studsesio disvolviĝis sukcese danke al la teknika realigo de *Katalin Kováts*. La sistemo, kiun ŝi konstruis kaj manaĝis surloke, ebligis kunigi la ĉeestajn kaj la forajn studentojn. Ambaŭ grupoj povis vidi kaj aŭdi la prelegantojn kaj unu la aliajn, sekvi la bildojn de la prezentaĵoj, ankaŭ starigi demandojn kaj aktive kontribui al la diskutoj. Pri la programo pretiĝis filmitaj registraĵoj, kiujn la studentoj – kiuj pro la horzonaj diferencoj ne ĉiam povis realtempe ĉeesti en la klasĉambro – povas spekti en la sekvaj semajnoj. La studmaterialoj kaj taskoj estas disponigitaj en la Klerigejo de **edukado.net**, en speciala reta studspaco por la studentoj danke al la prizorgo de Katalin.

19 studentoj povis partopreni danke al la **stipendio de ESF** (Esperantic Studies Foundation). La usona fondaĵo regule helpas la studojn ekde 2002. Lastatempe per fiksita sumo, krome ĝis 2500 dolaroj, pretas duobligi la donacojn, kiujn oni sendas por subteni la studojn. Pliaj informoj ĉe [ESF - AMU Poznanon](#).

Dum la malfermo de la studoj, la vicrektoro *Rafał Witkowski* salutis la gestudentojn per varmaj vortoj. La dekanino de la Novfilologia Fakultato *Krzysztof Stroński* akceptis prof. *Nicolau Dols* kaj la gvidantinon de la Studoj, ili interparolis pri la estonteco de la interlingvistikaj studoj. Ankaŭ la direktoro de la Etnolingvistika Instituto (kie funkcias la Studoj) alte taksis la 23-jaran progreson de la Studoj.

La agrablajn vesperajn kunestojn de la partoprenantoj kronis la tradicia *komuna vespero* (en septembro) kun kontribuo ankaŭ de la foraj partoprenantoj per filmetoj, de la lokaj esperantistoj kaj de la poznana





kantistino *Zuza Kornicka*. La kutima *miela vespero* de la kultura festivalo [Arkones](#) okazis nun dum tiu ĉi vespero.



Ilona KOUTNY

Gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj

Svislando

Falo je 20%

Laŭ la svisa ŝtata radio aperis en Ĝenevo scienca esploro pri falo de publikigado de sciencaj artikoloj de inaj aŭtoroj. La esploroj estis faritaj de la ĝeneva universitato kaj publikigitaj en *British Medical Journal*; ĝi koncernis la jarojn 2018 ĝis 2021. La geaŭtoroj de la esploroj konstatas, ke ekde la komenco de la pandemio la kontribuo de fakulinoj falis je 20%. La observantoj analizis la genron de la unua persono menciita en la aŭtorolisto de iu artikolo, do de la ĉefa aŭtoro (antaŭ la observita periodo inoj estis 46%) ; kaj la genron de la laste menciita nomo, kiu kutime estas iu pli aĝa kaj fama esploristo (antaŭ la observita periodo inoj estis 32%). Tiuj ciferoj koncernas Okcidenton. La falo okazis en tiuj ciferoj. Kompreneble estas diferencoj inter la diversaj landoj pri la antaŭesploraj mezaj nombroj. Ni ĉiuj scias, kiom la pandemio modifis niajn vivstilojn pro la trudizoliĝo, hejma laboro kaj aliaj postuloj de la ŝtatoj. Ŝajnas, ke la virinoj, kiuj laboris en universitatnivela esploro, donis prioritaton al instruado en universitato per retaj komunikiloj kaj organiza laboro en sia hejmo, en sia familio, kie ofte la infanoj devis ankaŭ resti hejme kaj sekvi siajn kursojn hejme. Daŭre la familia laboro estas pli patrina ol patra en plej multe da landoj. Do la virinoj

IPR 21/4➤35





flankenmetis sian karieron, kaj endanĝerigis ĝin. Male viraj fakuloj ne reagis same kaj plu laboris kiel kutime por atenti, ke ilia „curriculum vitae”, kariertabelo ([Kariertabelo - Vikipedio \(wikipedia.org\)](#)) ne havu ian truon en tiuj tiklaj jaroj 2020 kaj 2021. Sciendas, ke universitataj profesoroj estas elektitaj laŭ la nombro de siaj publikigaĵoj.

Mireille GROSJEAN

Vikipedio en Esperanto

Vikipedio en Esperanto estis fondita la 6-an de novembro 2001 kiel la 11-a lingvoversio de la interreta enciklopedio Vikipedio kaj nuntempe enhavas 290 448 artikolojn. Ĝia fondinto estas konsiderata la usona e_isto Chuck Smith. Esperantistoj kontribuis ankaŭ al la fondiĝo de kelkaj pliaj lingvoversioj de Vikipedio (ĉeĥa, slovaka, oseta, svahila) kaj la enkonduko de subteno de la Esperanta alfabeto en januaro de 2002 malfermis la vojon por la alfabetoj de aliaj lingvoj kaj plifruigis la transiron de la tuta Vikipedio al la normo Unikodo.

En oktobro de 2012 ĝi ampleksis pli ol 170 000 artikolojn kaj aktivis en ĝi 21 administrantoj. Laŭ la nombro de artikoloj ĝi estis la 27-a plej granda lingvoversio de Vikipedio. Ekzistis pli ol 68 000 registritaj uzantoj, el kiuj pli ol 480 aktivaj. Laŭ deveno de la redaktantoj la Vikipedio en Esperanto estas la plej internacia el ĉiuj lingvoversioj. Vikipedio en Esperanto estas ankaŭ la entute plej granda enciklopedio verkita en artefarita lingvo.

Fondiĝo

En decembro 2001, Chuck Smith laboris kun Jerry Muelver kaj Stefano Kalb por fari bazan Vikipedion de 139 artikoloj. La Esperanto-Vikipedio publikiĝis la 2-an de januaro 2002 kun pli ol 300 paĝoj. Unu jaron post la fondiĝo ekzistis 51 vikipediistoj, dudek el



WIKIPEDIO
La libera enciklopedio





ili „tre aktivaj” (pli ol cent redaktoj monate). Komune ili produktis 4.200 artikolojn.

Redaktantoj kaj artikoloj

En januaro 2008, la statistiko menciis entute 860 vikipediistojn, el ili 41 tre aktivaj, kiuj produktis komune 94 000 artikolojn. 76 % el la artikoloj havis pli ol duonan kilobajton, kio estas alta, sed ne treege. En junio 2008 la Vikipedio atingis la nombron de 100 000 artikoloj kaj havis lokon 20 inter la diversaj lingvoj. En aŭgusto 2014 ĝi atingis la nombron de 200 000 artikoloj.

Deveno de la redaktantoj

Inter aprilo 2011 kaj marto 2012, el ĉiuj redaktoj en la Vikipedio en Esperanto, 17,1 % estis faritaj el Francio, 13,2 % el Germanio, 11,6 % el Rumanio, 10,1 % el Hispanio, po 8,5 % el Ĉeĥio kaj Svislando, 5,4 % el Usono, 4,7 % el Hungario, 3,9 % el Pollando, 3,1 % el Belgio kaj po 1,6 % el Nederlando kaj Kolombio. Tio igas ĝin la plej internacia el la observitaj lingvaj versioj de Vikipedio, konkurante nur kun la Arablingva Vikipedio, en kiu tamen 42,8 % de la redaktoj venis el nur du landoj.

Graveco por la lingvo

La du plej gravaj enciklopediecaj verkoj en Esperanto traktas nur Esperanton: Enciklopedio de Esperanto (fakvortaro el 1934) kaj Esperanto en Perspektivo (manlibro el 1974). Pri ceteraj temoj ekzistis kaj ekzistas multaj fakaj revuetoj kaj ankaŭ *Scienca Revuo*, sed ne enciklopedio. Tial Vikipedio estas la unua vera enciklopedio pri ĝeneralaj temoj en Esperanto.

Grava teksto-donaco konsistas el la Enciklopedio el 1934. Kelkaj libro-aŭtoroj permesis al oni uzi aŭ preni tekstojn el konkreta libro, same la magazino *Monato*. Plejparte la tekstoj tamen estiĝas per tradukado el nacilingvaj vikipedioj kaj posta redaktado.

Iniciatoj

Esperanto-organizoj ne rekte kontribuas, sed subtenas la Vikipedion en Esperanto diversmaniere, ekzemple disponigas ĉambrojn dum renkontiĝoj por informado kaj trejnad. Dum la 93-a Universala Kongreso de Esperanto en Roterdamo (2008) okazis du vikipediaj kunvenoj kaj prelego dum la Esperantologia Konferenco. UEA, EEU kaj E@I subtenis Esperanto-informilon. Aparte E@I daŭre iniciatas vikipedian agadon en la interreto kaj lige al Esperanto-renkontiĝoj.

IPR 21/4➤37





Petro Chrdle, en sia artikolo SAEST kaj KAEST, pri fakaplikaj aranĝoj en Ĉeĥio kaj Slovakio rakontas pri la fakterminaraj taskoj ekde 1978 fare de foje AEST foje SAEST, kaj poste KAEST. Ekde 2002 la afero okazis en Dobřichovice, kiel sidejo de la agentejo mem, en 2002 mem kun ĉeftemo pri elektronikaj rimedoj. Tiuokaze elstara prelego estis tiu de Chuck Smith, fondinto de la esperantlingva Vikipedio kiel unu el la unuaj ne-anglalingvaj versioj en 2001, samjare kun la ĝenerala sistemo. Ekde tiam la rilatoj inter KAEST kaj vikipediistoj estis oftaj. En 2008 okazis trejnseminario por vikipedi-kontribuantoj fare de Pavla Dvořáková kun partopreno de Yves Nevelsteen, redaktoro de manlibro pri Vikipedio. Ĉiuj menciitaj eventoj kaj prelegoj estis kolektitaj en la respondaj prelegokolektoj.

Dekjariĝo

Por omaĝi la 10-jariĝon de la Vikipedio en Esperanto en 2011, Pavla Dvořáková (estrarano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio) kunlabore kun E@I okazigis de la 26-a ĝis la 30-a de oktobro en Svitavy (Ĉeĥio) la unuan esperantistan Vikimanion - unikan internacian renkontiĝon de esperantistaj vikipediistoj kaj interesiĝantoj pri Vikipedio.

Solena prelega kaj muzika programo omaĝe al la dekjariĝo de la Vikipedio en Esperanto okazis vendrede la 28-an de oktobro 2011 en la kultura salonego de la Domo de Ottendorfer en Svitavy (Ĉeĥio) kadre de la aranĝo Esperanta Vikimano. Sekve la fondinto Chuck Smith faris toston en la Esperanto-muzeo troviĝanta en la teretaĝo de la domo. La dekjariĝan solenaĵon partoprenis proksimume 66 personoj, inkluzive de Miroslav Malovec, esperantisto kaj fondinto de la Ĉeĥa Vikipedio, kaj David Šimek, urbestro de Svitavy.

Dudekjariĝo

Malferme de la jaro 2021 ILEI publikigis tekston de Mireille Grosjean pri la dudekjariĝo de la esperantlingva versio de Vikipedio. Sekvis UEA, kiu same kiel ILEI alvokis al kontribuado cele al atingo al 300 000 artikoloj. La 20-an de julio 2021 tiu artikolonombro estis atingita.

Fonto: https://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio_en_Esperanto





Diakronio kaj evolu-fazoj de la leksiko kaj de la vort-farado en Esperanto

de Philippe PLANCHON (Francio)

Resumo. Kiel vivanta lingvo, Esperanto necese evoluas pro la efiko de la tempo. Aliflanke, Esperanto estas ankaŭ karakterizata kiel konstruita lingvo, tiel ke gravas ankaŭ la kondiĉoj de ĝia apero. Ni klarigos kial necesas distingi tri evolu-fazojn. Tio devenas de la rilatoj inter normoj, uzoj kaj uz-ebloj. Tiel eblas konsideri la strategiojn, kiuj kontribuis al la ellaborado de la leksiko. Komence, la leksiko de Esperanto rapide evoluis, kaj tiu fenomeno estas analoga al tio, kion oni povas observi ankaŭ en aliaj lingvoj. La ekzisto de kontraŭaj tendencoj dum la komenca fazo kondukis al multe pli longdaŭra evoluo, tiel ke realiĝas iuj uz-ebloj, kiuj jam ekzistis dekomence en la sistemo de la lingvo. Tiurilate, ni montros, ke la leksiko kaj la vortfarado koncernas plurajn nivelojn en la funkciado mem de la lingvo, kaj ke tio ankaŭ ludas rolon por la ekvilibro de la sistemo kaj por la uzado de la parolantoj.

Ŝlosilvortoj: diakronio, lingvo-evoluo, *Fundamento de Esperanto*, neologismoj, arkaismoj.

1 Enkonduko

Laŭ tipologia vidpunkto, Esperanto estas kaj ordinara lingvo, kaj tute aparta lingvo. Ĉe la lingva nivelo, Esperanto ja similas al aliaj, etnaj lingvoj, kaj ne estas tiom eksterordinara (Koutny, 2015). Sed, ĉe la socia nivelo, Esperanto estas neatendita fenomeno, ĉar ĝi estas la sola planlingvo, kiu atingis tian gradon de ensociiĝo (Blanke, 1985), kaj pro tio estas grave distingi inter lingvoprojektoj kaj plene funkciantaj planlingvoj kiel Esperanto.

Kial Esperanto multe pli bone sukcesis ensociiĝi ol aliaj lingvo-projektoj? Certe estas sociologiaj faktoroj, kiel argumentas Ziko Marcus Sikosek (1999). Imagu, ke Zamenhof estus proponinta tute alian lingvon (ekzemple la klingonan)... Estas tamen malfacile supozi, ke iu ajn lingvoprojekto estus ricevinta la saman akcepton, nur pro la fakto, ke ĝi estus proponita de Zamenhof en 1887. Do ankaŭ la lingva konsisto certe ludis tre gravan rolon. Sed kiamaniere?



Ne temas nur pri elekto de tiu aŭ tiu alia formo de vortoj, radikoj, afiksoj. Pli profunde, temas pri la rilato mem inter la lingvo kiel kodo kaj la lingvo kiel praktika uzo.

Detlev Blanke tiel skribas: „Zamenhof intuicie komprenis la ĉefajn problemojn de strukturo kaj de funkciado de lingvo, inter kiuj estas la rilato inter lingvistika sistemo (*lingvo*) kaj ĝia aplikado (*parolo*), la graveco de lingva komunumo, la rilato inter stabileco kaj evoluo, kaj la problemoj de normoj kaj de kodigo de tiuj normoj” (2009, p. 255; mia traduko).

Fakte, lingvoprojekto estas komence en paradoksa situacio. Ĝi konsistas el normoj, kiuj ne estas uzataj de parolantoj. Poste ekaperas uzado, kaj fine aperas parolantoj. Inverse, ne-konstruitaj lingvoj konsistas el parolantoj, kiuj produktas paroladojn, kaj normigo alvenas poste. Kompreneble, internaj mensaj normoj (laŭ la koncepto de Chomsky; Vd. Miner, 2011) povas ekzisti dekomence en etnaj lingvoj, sed interna gramatiko aperas nur laste en Esperanto.

2 Kriterioj de viveco kaj natureco

Kiam eblas paroli pri vivanta lingvo? Kiam eblas paroli pri natura lingvo aŭ naturiĝinta lingvo? Tie aperas la neceso pri iu speco de evoluo. Fakte, tiu demando estas malnova. Ekzemple, la fama lingvisto Ferdinand de Saussure tiel diris pri tiu demando:

Tiu ĉi evoluo [de la lingvoj] estas fatala; ne ekzistas ekzemplo de lingvo kiu rezistus al tiu evoluo. Post iom da tempo, oni ĉiam povas konstati iujn efektivajn moviĝojn. Tio estas tiom vera, ke tiu principo devas esti atestebla eĉ se temas pri artefaritaj lingvoj. Tiu, kiu kreis artefaritan lingvon, tenas ĝin en la mano, ĝis la momento, kiam la lingvo komencas cirkuli. Ekde kiam ĝi plenumas sian rolon, kaj fariĝas ĉies afero, la regado ne plu eblas. Esperanto estas tiuspeca provo; se ĝi sukcesas, ĉu ĝi evitos tiun fatalan leĝon? Post la unuaj momentoj, la lingvo probable komencos sian semiologian vivon (...) Homo, kiu pretendus krei senŝanĝan lingvon, kiun la posteuloj devus akcepti tian, kia ĝi estas, similus al kokino kiu kovis ovon de anaso; la lingvo kreita de li estos forportita for de li, vole-nevole, pro la fluo, kiu kuntrenas ĉiujn lingvojn. (Saussure, 1995, p. 111; mia traduko)

Ĉi tie estas du argumentoj rilataj al la demando pri evoluo. La unua koncernas la disdialektiĝon de la lingvoj. La dua koncernas la naturecon de la lingvoj.





Pri la unua argumento, necesas konsideri, kiel povas evolui Esperanto. Nun estas parolantaro kaj multe da interŝanĝoj inter la parolantoj. Tamen tiu ĉi parolantaro estas disa laŭ geografia vidpunkto. Do Esperanto ekzistas ĉefe kiel praktiko inter parolantoj de diversaj landoj, kun diversaj gepatraj lingvoj. La situacio tute ne estas nun favora por disdialektiĝo. Verdire, disdialektiĝo postulas, ke la plejmulto da interŝanĝoj okazu inter parolantoj, kiuj vivas en la sama loko. Poste, ĉiu dialekto distingiĝas de aliaj pro distanco inter la komunumoj, sed la parolantoj de sama dialekto vivas kune en sama loko. Eĉ se Esperanto estus multe pli vaste uzata ol nun, tia supozata disdialektiĝo probable ne okazos, ĉar la komunikado per Esperanto plu estus inter homoj, kiuj ne havas la saman gepatran lingvon, do loĝantaj en diversaj lokoj. Ni povas eĉ aldoni, ke la disvolviĝo de interreto evidente estas plia obstaklo al tia disdialektiĝo.

Pri la dua argumento, Saussure uzas ĉi tie biologiajn metaforojn. Tamen, lingvoj ne estas vivantaj estaĵoj², kaj ne evoluas per apliko de naturaj leĝoj. La lingvoj povas evolui laŭ du manieroj: ĉu per konsciaj decidoj, ĉu pro inercio de la lingvoj. Konsciaj decidoj plene agas ĉe la stadio de lingvoprojekto. Sed post tiu momento, inercio pli kaj pli gravas por la evoluo de la lingvo. Inercio ne okazas hazarde, sed pro seriozaj kialoj, per adaptiĝo al eksteraj aŭ internaj bezonoj. La eksteraj bezonoj povas ekzemple esti neceso de adaptiĝo al novaj kulturaj, sociaj aŭ teknologiaj aferoj. La internaj bezonoj koncernas la lingvan sistemon, tiel ke la parolantoj senkonscie emas trovi iun ekvilibron en tiu sistemo, pro bezono de analogioj kaj reguleco, pro deziro de efikeco kaj de ŝparo de energio, kaj tiel plu.

3 Distingo inter evolu-fazoj

Nuntempe, Esperanto fariĝas pli natura lingvo, kaj tial Esperanto evoluas. Sed tiel ne estis ĉe la komenco. Tial, ni devas distingi tri ĉefajn evolu-fazojn de la lingvo.

La unua evolu-fazo [1878 - 1887] rilatas al la ellaborado de la lingvoprojekto. Ĝi ne estas limigata al la publikigo de la *Unua Libro*, kiu aperas fine de tiu fazo. Ĝi daŭris plurajn jarojn. Aparte menciindaj spuroj de tiu fazo estas la pra-esperantoj (1878, 1881). Fakte, tiu prepara periodo estas

² Fakte, Saussure eltrovis la principon de arbitreco de la signoj, kaj agnoskis ke lingvoj estas sociaj konvencioj.



interesa, ĉar Zamenhof provis diversajn solvojn³, kiujn li fine forviŝis. Ironie, pluraj decidoj de Zamenhof en 1887 estis poste kritikataj, kaj kondukis al proponoj en reform-projektoj (kiel tiu de 1894) aŭ en esperantidoj (i.a. Ido), kiuj ĝuste reuzas ideojn iam elprovitajn en la pra-esperantoj. Post la publikigo de la *Unua Libro* (1887), la lingvoprojekto estis libere uzebla de aliaj homoj, kiuj eklernis ĝin. Sed tiu uzo estis pli-malpli eksperimenta, ĉar ne estis certe, ke la lingvoprojekto povus konkrete funkcii. Tuj ekaperis etaj ŝanĝoj en la lingvo mem, la plej fama tiurilate estas ŝanĝo por iuj tabelvortoj jam en la *Dua libro* (1888)⁴.

La dua evolu-fazo [1887 - 1905] ankoraŭ ne similis al la ordinara evoluo de la etnaj lingvoj. Ĝi daŭris almenaŭ ĝis la unua UK kaj la adopto de la *Fundamento* (1905). Multaj diskutoj pri aliaj lingvoprojektoj kaj reformoj eble plu bremsis la ensociiĝon de la lingvo, tiel ke tiu stabiliga periodo eble daŭris pli longe. Tamen taŭgas konservi tiun daton por la fino de la dua fazo. Fakte, al tiu periodo aludas Saussure per la vortoj „Post la unuaj momentoj”, kaj tiam estis ĝuste por Esperanto la tempo, kiam Saussure skribis tiujn vortojn (ĉ. 1906-1911).

La tria evolu-fazo [ekde 1905 ĝis nun] estas la „semiologia vivo de la lingvo”. Ĝi plu daŭras, kaj dum tiu periodo, la lingvo submetiĝas al pli-malpli normala evoluado. Kvankam ŝanĝoj estas jam videblaj, la ŝanĝoj estas tamen tre malrapidaj, kaj eblas klare vidi ilin nur retrospektive. Do necesos pli longa tempo por observi pli radikalajn ŝanĝojn⁵. Verdire, la termino „diakronio” validas nur por tiu tria evolu-fazo. La unuaj du fazoj estas iom alispecaj. Kaj por studi evoluon de la lingvo, teorie sufiĉas distingi inter tiuj tri periodoj⁶.

³ Ekzemple: neniu akuzativo, manko de futuraj participoj (-ont/-ot), pli da latinidaj radikoj (1878), pliaj modifoj por la radikoj (1881), ktp. Pri la pra-esperantoj, vidu Waringhien (1959, 1980), Mattos (1987), Kiselman (2011).

⁴ La serio *ian, tian, kian, nenian, ĉian* povis okazigi konfuzon pro la ekzisto de la serio *ia, tia, kia...* kaze de uzo de akuzativo (*ia-n, ti-an, ki-an...*). Pro tio, la serio estis ŝanĝita al *iam, tiam, kiam...* jam en 1888.

⁵ En etnaj lingvoj, la ŝanĝoj estas profundaj nur post pluraj jarcentoj. Ekzemple en la franca, oni plu povas legi librojn el la 17a jc. Same, la Esperanta lingvo fine de la 19a jc. plu estas komprenebla por parolanto de la 21a jc. Tamen, oni povas dubi, ĉu reciproke Zamenhof tuj komprenus Esperantlingvajn tekstojn de la hodiaŭa tempo.

⁶ Pliaj distingo evidenta eblas. Ni povas mencii pli detalajn proponojn faritajn kaj diskutatajn de Ilona Koutny (2018), kiuj ebligas distingi plurajn periodojn ekde 1905 (per aldono de aliaj pivotaj datoj kaj periodoj: 1920, 1930, 1945, 1960,





4 Kompromiso kaj stabiligo de la lingvo-sistemo

Kiel stabiligi la lingvo inter 1887 kaj 1905? Ĉu estas esenca diferenco⁷ inter la *Unua Libro* kaj la *Fundamento*? Esperanto estis kreita per publikigo de baza normo, sed iusence, tio okazis dufoje: la unuan fojon per la *Unua Libro*, kiu estis lingvoprojekto, kaj la duan fojon per la *Fundamento*, kiu estas retrospektiva kaj konscia akcepto de la normo fare de la parolantaro.

Tiu distingo ŝajnas paradoksa, kvankam konforma al la sociolingvistika intuicio de Zamenhof, kiu konsciis la neceson de uzado kaj de parolantaro por krei ne nur lingvo-projekton, sed vivantan lingvon. Tiu strategio postulis kompromisojn, kaj la *Fundamento* estas tia kompromisa bazo ebliganta pluan evoluon. Tamen, tiu-epoke la ideo de gvida bazo aspektis iom strange⁸, des pli ke jam ekzistis lernolibroj. Do, multaj kritikis la Fundamenton kiel provon malhelpi la naturan evoluon de la lingvo. Sed tio estas misinterpreto. Zamenhof ĉiam rifuzis verki kompletan lingvon. Pro tio, la dua fazo trafe funkciis kiel stabiliga periodo.

Tiu stabiligo estis ja necesa, ĉar la lingvoprojekto ne enhavis ĉiujn pretigitajn detalojn. Kvankam Zamenhof multe pli preparis, ekzemple por la leksiko de Esperanto, ol li metis en la *Unuan Libron* aŭ en la *Fundamenton*, li preferis lasi al la vivo aŭ al institucioj la respondecon decidi pri la evoluo de la lingvo. Se la lingvo ne estas kompleta, la parolantoj kompletigu ĝin. Se la lingvosistemo ne estas stabila, ĝi stabiligu dum tiu elprova periodo.

Laŭ la kompromisa strategio, Zamenhof proponis modelojn, kiuj povis esti akceptataj aŭ ne. Tiu stabiligo okazis ĉe diversaj niveloj de la lingvo. Ekzemple, eblis dekomence uzi elizion (16a regulo), sed tiu ebleco ne estis multe uzata poste. La sintakso ne estis plene fiksita⁹, krom per

1989). Tamen, tiuj proponoj konsideras aliajn parametrojn, nome: evoluon de la lingvoscienco, produkton de gravaj verkoj (vortaroj kaj gramatikoj), gravajn politikajn kaj teknikajn ŝanĝojn. Tiuj parametroj povas influi la evoluon, sed ili nur aldoniĝas al la baza distingo, kiun mi konsideras ĉi tie, por la diakronio de la lingvo.

⁷ Krom la UL, la FdE baziĝas sur la *Dua Libro* (1888), la *Universala Vortaro* kaj la *Ekzercaro* (Vd. Ito, 1973).

⁸ Pro tio, la *Fundamento* estis uzata diversmaniere laŭ la epokoj kaj vidpunktoj: kiel baza lernolibro (almenaŭ komence de la 20a jc.), kiel lingvopolitika teksto (responde al reformismo), kiel kompleta sistemo (foje prezentita tiel kun propaganda celo), kiel historia dokumento (laŭ filologia vidpunkto), ktp.

⁹ Tial oni observas konstruojn, kiuj nun estas malmulte uzataj kaj kiuj povas eĉ aspekti iom arkaikaj; ekz-e ĉe Zamenhof: *la libristo-eldonisto ĝuste nun fermas la de ŝi skribitan kaj de li legitan kajeron*. (Marta, 1910); *poeto (...) kiu kantis pri la*





ekzemploj de frazoj (en la *Ekzercaro*). La pronomo *ci* arkaikiĝis jam frue. Li enkondukis nedefinitajn elementojn (*je*, *-um*), kiuj nur poste akiris apartajn funkciojn. Li menciis la uzon de *h* kiel surogata litero (en la *Alfabeto*), sed tiu uzebleco neniam ĝeneraliĝis. Fine, li esprimis saman ideon de libera stabiliĝo pri la leksiko, per la eblo aldoni novajn radikojn aŭ forlasi la uzon de aliaj, laŭ la tiel nomita *metodo de neologismoj kaj arkaismoj*.

Koncerne la leksikon, alia decido de Zamenhof estis la 15a regulo. Tiu regulo estas nur parte gramatika (rilate al la elekto de finaĵoj), sed ĉefa indikilo pri la maniero enkonduki novajn vortojn en la lingvon. Tiuj *fremdaj vortoj* estas plurfontaj radikoj, kaj tiumaniere, estas facile enkonduki en la lingvon *internaciajn vortojn*. Tiuj vortoj ĝenerale estas ankaŭ en lingvoj, kiuj iel rolis kiel lingvoj internaciaj, ekz-e la latina, la franca, la angla, la germana, la rusa... Do, pro internacieco, la lingvo facile akceptas novajn vortojn, eĉ se ili estas nek fundamentaj, nek oficialigitaj. Tio bone funkciis, tiel ke la nombro de radikoj rapide kreskis¹⁰, kiel montras la kresko de la nombro de radikoj inter la plej gravaj vortaroj de Esperanto (tabelo 1).

Tabelo 1 – Kvanta evoluo de la Esperanta leksiko

UL (<i>Unua Libro</i> , 1887): ≈ 920 radikoj
FdE (<i>Fundamento de Esperanto</i> , 1905): 2640 radikoj (inkluzive de UL)
OA (Oficialaj Aldonoj, publikigitaj ĝis 2007): 2182 radikoj (sume)
Ľ AVE (Akademia Vortaro de Esperanto): 4822 radikoj (= FdE + OA)
PV (<i>Plena Vortaro</i> , 1934): 6900 radikoj
PIV (<i>Plena Ilustrita Vortaro</i> , 1970): 15200 radikoj (39400 vortoj)
NPIV (<i>Nova Plena Ilustrita Vortaro</i> , 2002): 16780 radikoj (46890 vortoj)

Pri la elekto mem de la radikoj, Zamenhof plu uzis kompromisajn vojojn, kiujn oni povas forĵeti dum la posta evoluo de la lingvo, aŭ foje uzi kiel modelon por enkonduki novajn vortojn. Tiu strategio ĉefe aperis en la vorto-provizo, kiam mankis internacia radiko (ekzemple por ĉiutagaj vortoj). Tiel Zamenhof celis eviti dependecon de aparta etna lingvo.

liberiginto de Svisujo kaj pri la de Dio inspirita virgulino de Francujo. (Fabeloj de Andersen, 1916).

¹⁰ Tiu evoluo estas ordinara en la etnaj lingvoj, kie ofte estas periodo de t.n. *leksika eksplodo*. Por la franca lingvo ekzemple, tiu periodo estis inter la 11-a kaj 14-a jarcentoj (Vd. Müller, 1985, p. 63).





Interesa solvo estis la uzo de miksaj formoj, tiel ke ne plu estas eble identigi ununuran fontolingvon, ĉar pluraj partoprenas samtempe por konstrui la radikon (tabelo 2).

Tabelo 2 – Kompromisaj formoj inter pluraj fontolingvoj

lavango	germ. <i>Lawine</i>	kuko	germ. <i>Kuchen</i>
	ital. <i>valanga</i>		angl. <i>cake</i>
ĉapitro	angl. <i>chapter</i>	gliti	germ. <i>gleiten</i>
	franc. <i>chapitre</i>		fr. <i>glisser</i>
spegulo	lat. <i>speculum</i>	stablo	rus. <i>stanok</i>
	germ. <i>Spiegel</i>		fr. <i>éta</i> bli
ŝtono	angl. <i>stone</i>	ŝpruci	germ. <i>spritzen</i>
	germ. <i>Steine</i>		ital. <i>spruzzare</i>
ĝardeno	ital. <i>giardino</i>	ŝtupo	germ. <i>Stufe</i>
	angl. <i>garden</i>		rus. <i>stupjenj</i>

Kiam tiu kompromiso ne estis ebla, okazis modifo de la radikoj. Se temis pri longa radiko, la kriptigo povis okazi per forigo de silaboj aŭ per uzo de pli simplaj formoj¹¹.

Alia solvo estis la paralela elekto de diversaj fontolingvoj por vortoj, kiuj apartenas al sama gramatika kategorio aŭ semantika kampo. Jen kelkaj ekzemploj de tiu fenomeno:

- tempaj adverboj: lat. *hodiaŭ* (*hodie*); fr. *hier*aŭ (*hier*); germ. *morgaŭ* (*Morgen*)

- partikuloj: lat. *sed*; fr. *do* (*donc*); gr. *kaj*; pol. *ĉu* (*czy*); germ. *nu*; angl. *jes* (*yes*)

- pronomoj: angl. *ŝi* (*she*); fr. *ili*; fr./angl. *oni*; fr./angl./slav. *si*; lat. *mi*, *ni*, *vi*

En aliaj kazoj, Zamenhof elektis la latinan kiel unikan fontolingvon, ekzemple por diversaj prepozicioj (*sub*, *super*, *per*, *pro*, *inter*, *post*...) aŭ por bestonomoj (*sciuro*, *anaso*, *erinaco*...), probable ĉar la latina ŝajnis al li la plej neŭtrala el la disponeblaj fontolingvoj (kaj ankaŭ pro tio ke la latina ĉiam ludis gravan rolon por la formado de nomoj en la sciencoj).

¹¹ Ekz-e: rus. *neprejmennno* ⇒ *nepre*; lat. *procrastinare* ⇒ *prokrasti*; lat. *praeter* ⇒ *preter*.



Fine, oni devas aldoni ĉi tie ke la elekto de diversaj fontolingvoj povis ankaŭ okazi pro aliaj kialoj, interalie por eviti homonimojn¹². Tiu deziro eviti homonimojn ankaŭ devigis Zamenhof al kripligo de radikoj, se la fontolingvo estis la sama¹³. Tion li faris ankaŭ por eviti mistranĉojn¹⁴, kaj tiel klarigi inter la radika kaj la deriva karaktero de iuj apartaj vorto-formoj.

5 Inercio kaj ekvilibro en la evoluo de Esperanto

La leksiko evoluis ekde 1905, almenaŭ laŭ la nombro de radikoj (cf. tabelo 1), kiuj nun estas pli multaj ol komence. Ekzistas debatoj pri la taŭgeco de tiu evoluo (Piron, 1987). Aliflanke, ni observas arkaikiĝon de iuj vortoj. Ĝi ofte devenas de la evoluo mem de la socioj, tiel ke multaj vortoj ne plu estas uzataj¹⁵ (Johansson, 2005). Tio ne signifas ke ili ne plu estas uzeblaj, sed ke ili probable ne plu estas konataj de la plejmulto¹⁶. Inverse, la evoluo de la socioj ofte devigas enkonduki novajn radikojn, por novaj teknologioj aŭ sociaj realoj (*komputilo, interreto, televido...*). Tutlasta ekzemplo estas *koronaviruso* aŭ *kronviruso*, kun hezito de la parolantoj pri la uzenda formo. Diversaj instancoj povas influi la uzojn, kvankam la evoluo forte dependas de la inerciaj fortoj de la lingvo (Lo Jacomo, 1981; Gledhill, 1998).

Evoluo de leksiko rilatas al la sistema ekvilibro de la lingvo. Foje aperas novaj radikoj anstataŭ malnovaj. La kunekzisto de similaj formoj ofte okazigas malaperon aŭ specialiĝon de la arkaika formo¹⁷. La formoj eniras

¹² Ekz-e, *sola* el lat. *solus*, sed *suno* el angl. *sun* (*lat. *sol*) kaj *grundo* el germ. *Grund* (*lat. *solum*).

¹³ Ekz-oj el la franca: fr. *peser* ⇒ *pesi* ≠ *pezi*; fr. *accorder* ⇒ *akordi* ≠ *agordi*; fr. *vers(er)* ⇒ *verso* ≠ *verŝi*.

¹⁴ Ekz-e: *diboĉi* (**de-boĉi*); *rikolti* (**re-kolti*); *cigaredo* (**cigar-eto*); *rubeno* (**rub-ino*); *makzelo* (**makz-ilo*).

¹⁵ Jen kelkaj ekzemploj: *gamaŝo, stani, kitelo, stupo, nankeno, meĉaĵo, tombako, grafo, tetrao, krispo...*

¹⁶ Eĉ por pli konataj vortoj kiel *grafo, Tekstaro* montras diferencon de frekvenco inter du ekvivalentaj periodoj: dum la unua periodo (1887-1917), *grafo* aperas 138-foje; dum la dua (1995-2003), ĝi aperas nur 8-foje.

¹⁷ Ekz-e: *malsanulejo* ⇒ *hospitalo*; *depago* ⇒ *imposto*; *dunaskito* ⇒ *ĝemelo*; *rampaĵo* ⇒ *rampulo*; ktp.





jam ekzistantan sistemon. La ekvilibro mem de la lingvo kontribuas al tiu evoluo, ekzemple se iuj vortoj ne estas regule formitaj¹⁸.

Al kelkaj partoj de la vortprovizo klare plu mankas kohereco. La landnomoj estas bona ilustraĵo. Ili povas esti endonimoj laŭ la nacia lingvo (ekz. *Barato*) aŭ ekzonimoj laŭ pli internacia formo (*Hindio*). Plie, ili baziĝas sur etnonimo (*Franco* estas nomo de loĝanto) aŭ sur toponimo (*Kanado* estas nomo de la lando), kun eventualaj hezitoj (ĉu *Koreo* estas lando aŭ loĝanto?). Povas esti uzo aŭ ne uzo de sufiksoj (*Svisio* aŭ *Svislando*), kaj estas du eblaj sufiksoj, kun nuna emo anstataŭigi *-ujo* (*Francujo*) per la sufikso *-io* (*Francio*). La evoluo povas koncerni la radikon mem kaj ĝian formon (ekz. *Ĥin-* anstataŭ *Ĉin-io*)¹⁹.

Tiu ekzemplo montras, ke la ekvilibro de la leksiko dependas ankaŭ de aliaj partoj de la lingvo. Ekzemple, *Ĥinujo* ne estas arkaisma nur pro la uzo de la sufikso *-ujo*, sed ankaŭ pro la arkaismo de la radiko *ĥin-*, kaj ankaŭ pro la arkaisma uzo de la fonemo /x/. Tiu malapero de /x/ ja okazas interne de la fonem-sistemo. Sed la fonologio influas la evoluon de la leksiko. Tio manifestiĝas en vortaroj per la enkonduko de novaj radik-formoj²⁰. Do, tiuj neologismoj ne aperas pro novaj realaĵoj (*komputilo*), sed pro pli profunda modifo de la lingvosistemo.

Evoluo de leksiko povas esti ankaŭ influata de la evoluo de la morfologio, kiel montris la rilato inter vortfarado, sufiksoj, kaj landnomoj. Tio validas ankaŭ por la ekzisto de konkurencaj formoj, kiuj finiĝas per *-cio* aŭ per diversaj pseŭdo-sufiksoj, kiuj originale devenas de la latina formo (*redakcio* aŭ *redaktejo*, *tragika* aŭ *tragedia*, *evolucio* aŭ *evoluo*...).

La morfologio ankaŭ evoluas. Ekzemple la morfemoj plu fariĝas memstare uzeblaj. Tiu procezo daŭras preskaŭ dekomence. Krom kelkaj esceptoj, nun estas ordinare uzi iun ajn vortelementon kiel radikon. Memstareco de la morfemoj koncernas la sintakson, la regulojn de

¹⁸ Ekz-e: pro reinterpretado de *malgraŭ* kun la prefikso *mal-*, la nova formo *graŭ* fariĝas tute kohera neologismo.

¹⁹ La politikaj situacioj kaj sociaj praktikoj ankaŭ povas evolui, ekzemple se aperas novaj landoj Tio laste okazis en la ekssocialismaj landoj. *Ĉeĥoslovakio* malaperis en 1993 kaj ekde nun estas du landoj; sed kiel nomi la okcidentan: ĉu *Ĉeĥio*, ĉu *Ĉekio*, ĉu *Ĉeskio*? Certe ĉi-terene estas ankaŭ influo de la etnaj lingvoj kaj de politiko.

²⁰ Tiel aperas *tekniko* anstataŭ *teĥniko*, *kirurgio* anstataŭ *ĥirurgio*, *arkaismo* anstataŭ *arĥaismo*, kaj tiel plu.



vortfarado, kaj eĉ la konsiston de la vortprovizo²¹. Do ĉi tie ankaŭ la subsistemoj de la lingvo estas interligataj kaj kune evoluas. La lingvo evoluas seninterrompe kiel kohera sistemo.

Ni konstatas, ke diakronio estas observebla en konstruita lingvo. Tio estas argumento por taksi Esperanton kiel vivantan lingvon, kaj ankaŭ kiel naturiĝantan lingvon. Fakte, ĉiuj ŝanĝoj, ĉu en etnaj lingvoj, ĉu en planlingvoj, ĉiam estas kaŭzataj de la homoj mem, konscie aŭ nekonscie. Do, la *natur*o, laŭ la senco de la biologio, ne intervenas en tiuj aferoj. Tio, kio eble intervenas, estas la *homa natur*o, t.e. la deziro adaptiĝi kaj esprimi sin plej bone per lingvaj rimedoj. Per pli profunda rigardo al la lingvoj, tiu abstrakta nocio de *homa natur*o eble klariĝos. La kapablo de la homoj krei novajn lingvojn kaj igi ilin vivantaj, estas tiurilate kerna demando, kiu povas helpi nin pli bone kompreni el kio vere konsistas tiu *homa natur*o.

Referencoj

Detlev BLANKE (1985). *Internationale Plansprachen: eine Einführung 'Internaciaj planlingvoj: Enkonduko'*. Sammlung Akademie-Verlag Sprache 34. Berlin: Akademie-Verlag.

Detlev BLANKE (2009). Causes of the relative success of Esperanto, *Language Problems and Language Planning (LPLP)*, n^o3 / 2009, p. 251-266.

Ferdinand DE SAUSSURE (1995). *Cours de linguistique générale 'Kurso de ĝenerala lingvistiko'*. Parizo: Grande Bibliothèque Payot.

Michel DUC GONINAZ (red.) (2002). *Nova Plena Ilustrita Vortaro*. Parizo: SAT.

Christopher GLEDHILL (1998). *The Grammar of Esperanto. A corpus-based description 'Gramatiko de Esperanto. Korpus-bazita priskribo'*. München: Lincom Europa.

Emile GROSJEAN-MAUPIN (red.) (1935). *Plena vortaro de Esperanto*. Paris: SAT.

Kanzi ITO (1973). *Unuaj libroj por Esperantistoj*. Kioto: Eldonejo Ludovikito.

Sten JOHANSSON (2005). Uzi interreton kiel tekstaron por lingvaj esploroj. En M. Lipari kaj H. Tonkin (red.), *Interlingvo inter lingvoj*, p. 221-241. Rotterdam: UEA.

Christer KISELMAN (2011). Variantoj de Esperanto iniciatitaj de Zamenhof. *Esperantologio / Esperanto Studies*, n-ro 5, p. 79-149.

²¹ Ekz-e, *ulo* estas memstara vorto, kiu funkcias apud aliaj vortoj kun similaj signifoj (*homo, persono, individuo*).





Ilona KOUTNY (2015). A typological description of Esperanto as a natural language '*Tipologia karakterizo de Esperanto kiel natura lingvo*'. *JKI*, n-ro 10, p. 43-62.

Ilona KOUTNY (2018). De la planlingvo de Zamenhof ĝis nature disvolviĝanta lingvo: etapoj de la evoluo de Esperanto. En *Conferenze 141, Ludwik Zamenhof okaze de la centa datreveno de la morto*, Accademia Polacca delle scienze, p. 89-98.

François LO JACOMO (1981). *Liberté ou autorité dans l'évolution de l'espéranto* '*Libero aŭ aŭtoritato en la evoluo de Esperanto*'. Doktoriga disertacio. Universitato Parizo V.

Geraldo MATTOS (1987). *La deveno de Esperanto*. Chapecó: Fonto.

Ken MINER (2011). The impossibility of an Esperanto linguistics / La neeblo de priesperanta lingvoscienco. *Interlingvistikaj Kajeroj*, n-ro 2:1, p. 26-51.

Bodo MÜLLER (1985). *Le français d'aujourd'hui* '*La franca hodiaŭ*'. Klincksieck.

Claude PIRON (1987). *La bona lingvo*. Vieno: Pro Esperanto.

Ziko Marcus SIKOSEK (1999). *Esperanto sen mitoj*. Antverpeno: FEL.

Gaston WARINGHIEN (1959). *Lingvo kaj vivo*. Antverpeno / La Laguna: Stafeto.

Gaston WARINGHIEN (red.) (1970). *Plena Ilustrita Vortaro*. Parizo: SAT.

Gaston WARINGHIEN (1980). *1887 kaj la sekvo...* La Laguna: Stafeto.


L. ZAMENHOF (1887). *Международный языкъ. Предисловіе и полный учебникъ* '*Lingvo Internacia. Antaŭparolo kaj Plena Lernolibro*'. Varsovio: Ĥaim Kelter.

L. ZAMENHOF (1888). *Dua Libro de l' lingvo internacia*. Varsovio: Ĥaim Kelter.

L. ZAMENHOF [1905] (1991). *Fundamento de Esperanto*. Pizo: Edistudio.

L. ZAMENHOF (1910). *Marta*. Parizo: Librairie Hachette et Cie.

L. ZAMENHOF [1916] (1932). *Fabeloj de Andersen*. Esperantista Centra Librejo.



Biografio de la aŭtoro. Philippe Planchon estas ŝtata instruisto kaj esploristo en la Fakultato pri Literaturoj kaj Lingvoj de la Universitato de Tours en Francio. En 2013, li sukcese defendis doktorigan disertacion pri enunciativa lingvistiko, kaj la sekvantan jaron, li estis nomumita ĉe la Universitato de Tours kiel docento, kie li instruas nun lingvistikon, i.a. pri leksikologio, semantiko, pragmatiko, interlingvistiko kaj kompara lingvistiko. Lia esplor-kampo estas la diverseco de la lingvoj kaj la konstruado de la vortosignifoj. Li estas membro de la lingvistika laboratorio LLL (*Laboratoire Ligérien de Linguistique, UMR 7270*).





Kongresaj kaj simpoziaj informoj

ILEI-kongreso 2022: „*Esperanto en dulingva aŭ plurlingva edukado*” - Kebekurbo, Kanado, 30 julio-06 aŭgusto 2022

En 2022 la ILEI-Kongreso okazos denove en ĉeesta medio en la belega Universitato Laval, en Kebekurbo, Kanado, de la 30-a de julio ĝis la 6-a aŭgusto 2022. La ĉeftemo de la 55-a Kongreso de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) estas: „*Esperanto en dulingvaj aŭ plurlingva edukado*”. Okazanta en oficiale du, sed fakte plurlingva lando, la kongresa ĉeftemo certe vekos la intereson ne nur de esperantistoj, sed ankaŭ de profesiuloj pri du- aŭ kelk-lingva edukado, universitataj esploristoj kaj profesoroj, ĵurnalistoj kaj ĝenerala publiko kiuj sin dediĉas al tiu temo, ĉu profesie, ĉu ne.

Ni atendas vian aliĝon kaj viajn kontribuojn ĉu por la kongresa ĉeftemo, ĉu por aliaj programeroj kiel prelegoj, lingva festivalo, internacia vespero ktp. En la aliĝilo vi povas indiki pri viaj kontribuoj kaj vi povas sendi tion kaj/aŭ viajn demandojn al ilei.kongresoj@gmail.com.

La limdato por sendo de la proponoj estas la **15-a de marto 2022** por esti enmetita en la provizoran programon. Por viaj prelegoj aŭ aliaj kontribuoj bonvolu sendi:

- titolon de la prelego
- 2-linian priskribon de la prelego
- nomon de la preleganto
- 2-linian viv-resumon de la preleganto
- daŭron de la prelego
- ĉu la prelego okazos ĉeeste aŭ rete

Kiel kutime, vi povos ankaŭ ĝui diversajn ekskursojn, lingvan festivalon, indiĝenajn spektaklojn, ktp.

Vi trovos ĉiujn detalojn pri la aliĝo (kaj baldaŭ ankaŭ pri la loĝado) en la ttt-paĝaro „2022.kongreso.org”, kies ligilo troveblas ankaŭ en la retejo de ILEI, t.e.: www.ilei.info

*Laura BRAZZABENI
Estrarano pri kongresoj*





ILEI-kongresa simpozio: „*Esperanto en dulingva kaj plurlingva edukado*”.

Unua Alvoko al ILEI-Simpozio (Kebekurbo, 04-05 aŭgusto 2022).

En la espereble unua postpandemia jaro de la nuna jardeko okazos, en Kebekurbo, ekde la 30-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto 2022, la 55-a Kongreso de *Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj* (ILEI), kies ĉeftemo estos: „*Esperanto en dulingva kaj plurlingva edukado*”. Pritraktata en oficiale du-, sed fakte plurlingva lando, la kongresa ĉeftemo certe vekos la intereson ne nur de esperantistoj, sed ankaŭ de profesiuloj pri instruado de alilandaj lingvoj, universitataj esploristoj kaj profesoroj, ĵurnalistoj kaj ĝenerala publiko kiuj sin dediĉas al tiu temo, ĉu profesie, ĉu ne. Tial, celante altiri tiujn, kies dialogo kun tiu kongresa temo estas pli profunda, ILEI rezervas la du lastajn labortagojn de sia Kongreso por okazigo de ĝia jam tradicia ILEI-Simpozio.

Ĝi okazos de la 4-a ĝis la 5-a de aŭgusto 2022, kaj estos malferma por (ne)esperantistaj fakuloj kaj interesatoj, ebligante ilian debaton pri temoj de komuna intereso observataj el diversaj vidpunktoj. La laborlingvoj estos laŭvice Esperanto, la franca kaj la angla.

Celante diversaspektan traktadon de la Simpozia ĉeftemo, oni komprenas ke ĝi inkluzivas, sed ne limiĝas al la jenaj subtemoj:

- Didaktikoj por instruado de lingvo al diverslingva lernantaro
- Uzado de interretaj teknologioj por instruado de Esperanto
- Esperanto en la kultura mozaiko de Kebekio kaj de Kanado
- Uzado de Esperanto por interŝanĝo de kulturaj valoroj
- Pedagogiaj valoroj de Esperanto-kulturo
- Kontaktoj inter kulturoj: harmonio kaj pliriĉiĝo
- Tradukado kiel didaktika ilo por instruado de lingvoj
- Interkultura lernado kaj edukado per Esperanto
- Kulturaj temoj kaj instrumaterialoj en lingvolernado
- Specifaĵoj kaj postuloj de plurlingva edukado
- Lingvaj rajtoj kaj edukado
- Interkultura komunikado en plurlingvaj edukmedioj
- Indiĝenaj kaj minoritataj lingvoj en edukado

Se vi deziras prelegi pri tiu ĉi temaro, aŭ pri io alia koncernanta la Kongresan ĉeftemon, ni tre kore invitas vin anonci vin per sendado de retmesaĝoj al ilei.kongresoj@gmail.com, kopie al magisterpita@gmail.com.





Bonvolu konsideri, ke via prelego povos esti prezentita per la kongresaj retkanaloj, do se vi estas en alia lando, ju pli frue vi anoncus vin, des pli facile estos aranĝi por vi la laŭhorzontan plej konvenan momenton por via prelego. (Se via sinanonco alvenos ĝis la 15-a de februaro 2022, vi ege helpos la organizan komitaton).

Post via sinanonco, bonvolu sendi vian prelegproponon al ilei.kongresoj@gmail.com, same kopie al magisterpita@gmail.com. Bonvolu sekvi la ŝablonon en la Aldonaĵo 1. La limdato por sendo de la prelegproponon estas la **15-a de marto 2022**.

Viaj prelegoj devas esti originalaj, ne publikigitaj nek planataj por publikigo aliloke. Surbaze de viaj kontribuoj ni redaktos provizoran programon, kiun ni sendos al vi, kaj vi estos petataj sendi kompletan tekston de via prelego ĝis la **31-a de majo 2022**. Viaj prelegresumoj estos publikigitaj en la *Kongresa Libro*, kaj la plenaj prelegtekstoj en *Simpoziaj Aktoj*. Por via prelego vi disponos pri 20 minutoj, kun 10 minutoj por diskuto. La preleglingvo povas esti aŭ Esperanto, aŭ la franca aŭ angla (ĉi-kaze kun paralela prezento en Esperanto).

Ĉiuj aliĝintoj de la kongreso aŭtomate rajtas partopreni en la simpozio sen apartaj aliĝilo kaj kotizo. Tiuj, kiuj volas aliĝi *nur* al la simpozio, kiel preleganto kaj/aŭ aŭskultanto, povas uzi la saman kongresan aliĝilon (baldaŭ diskonigota) kaj pagi la nur-simpozian kotizon.

Bonvenon!

Fernando PITA

je la nomo de la organiza komitato

Aldonaĵo 1.

Ŝablono de prelegpropono

Via prelegtitolo

Via plena nomo, Via institucio (ILEI, AIS, Universitato de ... , aŭ simile)

Resumo: Ĉi tiu ŝablono difinas strukturon kaj enhavon de ILEI-simpoziaj kaj aliaj ILEI-kongresaj prelegproponoj. Por resumi vian prelegon bonvolu uzi 100 - 200 vortojn.

Ŝlosilvortoj: (3 - 5 ŝlosilvortoj) elektu la vortojn/esprimojn kiuj plej trafe indiku al leganto kiujn fakojn kaj faktojn via prelego pritraktos.

Aŭtoro: Por prezenti vin kiel aŭtoron bonvolu uzi maksimume 150 vortojn. Via preskvalita foto estu aldonita en aparta dosiero.





INFORMOJ PRI ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (prez.), Mireille Grosjean (vicprez.), Mónika Molnár, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.
Elekta: Aurora Bute (gvid.), Zsófia Kóródy, Aristophio Alves Filho.
Kontrolo: Simon Smits (*la dua membro elektota*)
Lerneja: Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.
Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill.
Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny, Mireille Grosjean.
Universitata: Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Gong Xiaofeng „Arko”, Goro Kimura, Ilona Koutny, Katalin Kováts, Kristin Tytgat, Vicente Manzano-Arrondo, Radojica Petrović, Ivan Colling.

Enmovadaj partneroj (entute 14)

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Vítazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, info@ikso.net. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>.
Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj. Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: redaktanto@edukado.net.
ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983, Trejnsejnoj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, zsafia.korody@esperanto.de.
IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio): *vd. la retpaĝon de UEA*
TEJO (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Fernando Pita**.
Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Albert Stalin Garrido**.
UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, www.uea.org. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Ahmad Reza Mamduhi**.
Observanto de UEA ĉe ILEI: **Duncan Charters**.

kaj aliaj

Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

ALTE (*Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo*) Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**.
FIPLV (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*)
UN (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leysester Miro**.
Unesko (kun statuso de observanto): Reprezentantoj de ILEI: **Monique Arnaud** (ĉefdelegito), Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, monique.arnaud@aliceadsl.fr, **Martine Demouy, Max Demouy, Jesper Jakobsen, Josiane Moirand**

kaj aliaj





Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 25 € en A-landoj (laŭ la malnova UEA-difino), **12,50 € en B-landoj kaj 2 € en C-landoj**, kun ricevo de **4 numeroj de IPR jare**. Kun aliro nur al la reta versio de **IPR** membreco kostas **12,50 € por la A-landoj, 6,25 € por la B-landoj kaj 1 € por C-landoj**. Supera membro estas tiu **ILEI-membro**, kiu mendas paperan **IPR** kaj paperan *Juna Amiko* (JA). Tio kostas por **A-landanoj 40 € kaj por B-landanoj 22,50 €**. Abono de JA papera kostas 18 € en A-lando, 13 € en B-lando. Abono de JA reta kostas 11 € en A-lando, 7 € en B-lando. Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por JA akceptas abonojn enlande. Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al Karine ARAKELIAN, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio, <ilei.kasisto@gmail.com>. Bv klare indiki la celon de via pago. La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de la nederlanda ILEI-banko aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:

a) Pagoj al la nederlanda banko de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bonvolu aldoni 5 € por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo) kaj EU.

b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: Por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 30 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).

* Retpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

REDAKCIAJ INFORMOJ

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Marc CUFFEZ, *Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende*. **Teknika helpo**: Stano MARČEK. **Presado**: Alfaprint, Martin, Slovakio. **Redaktoro**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario*, jozefo.nemeth@gmail.com, www.ilei.info/ipr/; tel: (+36-70) 931-0530.

Peranto de ILEI kadre de LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj): Olena Poshivana, amatalena@ukr.net.

**Ni fermis la nunan numeron la 31-an de oktobro 2021,
redaktofino por la sekva numero: la 15-an de januaro 2022.**





Tuŝsenso kaj aliro al artĝuado (vd. p. 11)



La internaciaj Interlingvistikaj studoj de UAM en nova formo (vd. p. 32)



